

Kun terminaro  
'Pontoj kaj vojoj'

1959

*Lamenhof-Jaro*

**JARLIBRO**

**1959**

**DUA  
PARTO**

**UNIVERSALA  
ESPERANTO-ASOCIO**  
(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

# TEKNIKA TERMINARO

PRI

**SOSEOJ KAJ PONTOJ**

DE

**A. BROISE**

**ELDONIS U.E.A. — JARLIBRO 1959 DUA PARTO**

Sur la sekvantaj paĝoj ni publikigas la Terminaron pri Soseoj verkitan de Ing. A. Broise. Pri ĝia teksto respondecas, kompreneble, li mem kaj tiuj fakuloj kaj kompetentuloj pri la diversaj lingvoj, kiujn li mencias en sia Antaŭparolo.

## ANTAŬPAROLO

Pri la verko respondecas la verkinto. Tamen li multe dankas al kelkaj sindonemaj samideanoj : pri la teksto, al S-roj Albault, Atkinson, Haferkorn, Moberg; pri la nacilingvaj tradukoj, al S-roj Prewitt (angla-usona lingvo) kaj Lienhardt kaj Haferkorn (germana).

La verkinto provis uzi la vortojn troveblajn en Plena Vortaro (PV) kaj en suplemento de PV (PVS). La aliaj fontoj estas :

Wüster : Enciklopedia Vortaro (EW)

Rosher : Fervoja Terminaro (FT)

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio : Fervoj-Teknika Leksikono (FL)

Moberg : Konstruteknika Terminaro (KT)

Azorin : Arĥitektura Vortaro (AV)

Haferkorn kaj Dellian : Scienca Teknika Terminaro (STT)

Verax : Enciklopedia Vortareto (EV)

la estonta Plena Ilustrita Vortaro (PIV)

Waringhien : Grand Dictionnaire Esperanto-Français (WD)

La neceso distingi inter aĵoj fake distingendaj kondukis al uzo de kelkaj specialaj terminoj :

angulrelo (EV) anstataŭ angulfero, ĉar estas ankaŭ angulfero la objekto uzata por rigidigi angulon de fenestro, la ferlato laŭlarĝe ofte fleksita por subteni breton; cetere WD enhavas : gardrelo, handrelo.

markŝtono : elstara ŝtono pli-malpli tranĉita, uzata rinda kiel gardŝtono aŭ limŝtono, eĝhava kiel distancŝtono.

bordo (figure uzata) : strio de tero kuŝanta apud io.

cimento, anstataŭ cemento de PV 1, pro PIV

cizali FL : 1 tondi metalon per la taŭga ilo (cizalilo);

2 (f) kruce trairi vojon aŭ fervojon.

deponejo FT

rami PIV : per maŝino aŭ mana ilo enbati foston, palison, pavimeron por ĝin enigi, fiksi, firmigi.

oblonga WD : en formo de rektangulo.

kver FT : orta tranĉo.

dovelo AV : unu el la tranĉitaj ŝtonoj, kiu formas la kapon de volbo.

celumi WD

ĉar -isto estas sufikso pri profesio, oni preferis derivi de aŭto kaj de ciklo 3 (PV):

aŭti = veturi per aŭto; aŭtanto, metie : aŭtisto

cikli = rajdi sur ciklo; ciklanto, metie : ciklisto.

Pri plata ajo :

plato = ĝenerala vorto pri objekto plata.

kahelo = plata ajo por pavimi aŭ tegi ion.

slabo : el angla slab = mezdika plato el ŝtono, betono, cemento, asfalto, ĝenerale oblonga.

plado = ronda plata ajo, maldika disko.

panelo = granda maldika plato ĝenerale oblonga aŭ kvadrata.

plako = oblonga aŭ kvadrata paneleto.

Oni ne distingis en la komponitaj vortoj inter ŝtalo kaj fero konforme al la naciaj fakaj kutimoj, komprenite ke fero estas ĝenerala termino pri fero aŭ ŝtalo.

La novaj proponitaj vortoj estas :

taluto = supraĵo de taluso (PVS); = glaciso iom kruta.

daŭlo = surfaco de la volbosubo.

slabo = vidu supre.

virko = laboritaĵo, materia produkto responde je "verko", kiu estas spirita produkto.

Pri pasejo tra- aŭ trans- traka, oni elektis : pasejo traknivela, subtraka, supertraka.

Kiam du veturiloj laŭiras la saman vojon samsence, ne ŝanĝante sian vicon, ili iras anservice. Se la malantaŭa iĝas la unua, ĝi pasas pretere. Kiam du veturiloj laŭiras la saman vojon malsamsence, ili pasas renkonte. Kiam ili laŭiras kruciĝantajn vojojn, ili pasas kruce.

takometro : topografia aparato anstataŭ la pli internacia formo takimetro pro la jam ekzistanta "takimetro" = mezurilo pri rapideco.

skopo, jam en teleskopo, permesas distingi : ortangulilo aŭ ortilo desegna aŭ lignajista disde la topografia "orteskopo"; angulilo desegna aŭ lignajista disde la topografia angulskopo; nivelilo : simpla aparato uzata por konstati horizontalecon disde la nivelskopo; kaj ankaŭ permesas nomi mallonge la aparaton por mezuri deklivecon "deklivoskopo".

Broise inĝeniero

## MALLONGIGOJ

|       |   |
|-------|---|
| " "   | termino tuj antaŭe difinita                   |
| ( )   | klarigo forigebla                             |
| — —   | io forigebla                                  |
| (= )  | samsenca termino, signifo                     |
| /     | inter radikoj de sama vorto                   |
| 5 8   | trovebla en § 5 kaj 8                         |
| 5-8   | trovebla en § 5 kaj sekvantaj ĝis 8 inkluzive |
| 5+    | trovebla en § 5 kaj 6                         |
| (b 6) | vidu bildon 6                                 |
| kp    | komparu                                       |
| t.e.  | tio estas                                     |
| v     | vidu  |

# TEKNIKA TERMINARO

## PRI

### ŜOSEOJ KAJ PONTOJ

#### I. ŜOSEOJ : HISTORIO

1) Por surtera transporto ni ordnare uzas vojojn. La unuaj vojoj estis paŝsignaroj (= spuraro), kiujn premis la piedoj de homoj kaj bestoj. Tiuj spuraroj povis esti tre deklivaj. Kiam ekestis veturiloj, oni devis elekti irliniojn modere deklivajn, larĝigi la batitajn vojojn, kaj firmigi ties grundon. Tiam oni konstruis vojojn, metante sur grundon ŝtonojn, ŝtonrompajojn aŭ gruzon, kelkafoje pavimerojn. Tiel ekestis la ŝoseoj, t.e. la firme konstruitaj vojoj.

2) La unuajn ŝoseojn konstruis la Egiptoj kaj la Kaldeoj. Poste la Romanoj konstruis firmajn ŝoseojn, kiuj iom post iom difektiĝis. Dum la Mezepoko ekzistis nur nefirmaj vojoj sed almenaŭ en Francujo oni konstruis multajn pontojn. En la XVIa kaj XVIIa jarcentoj oni denove konstruis kelkajn ŝoseojn en Francujo; kaj en la XVIIIa jarcento ekis ampleksa konstruo de ĉarŝoseoj. Oni konstruis ilin komence dikaj, kaj post Mac Adam maldikaj. Nun oni provas konstrui ŝoseojn el simpla tero elektita, miksitaj kaj batita; sed ĝis nun tia grundŝoseo finfine ne ŝajnas pli malmultekosta ol ŝtonŝoseo, krom en senŝtonaj regionoj.

#### II. DIVERSAJ SPECIOJ DE VOJOJ

3) Vojo estas ĝenerala vorto. Laŭ ĉefideo de ira ago, irloko aŭ vojo estas nomata: irejo, pasejo, trairejo, promenejo, komunikejo.

Laŭ allaseblaj irantoj, vojspeco estas nomata: pado (= piedvojeteto), mulvojeteto, brutvojo, ĉarvojo, tirbesta vojo, aŭtovojo, rajdvojeteto.

Depende de la loko, vojo estas nomata: trapasejo; montpasejo, se ĝi uzas profundan valon aŭ intermonton (= malpli alta pasejo inter du montoj); kornico (= mallarĝa vojeteto borderanta profundegajon).

Laŭ materialoj konsistigantaj vojon, vojo estas nomata : spurvojo (= vojo el natura grundo kunpremita de cirkulantaro); grundvojo (= spurvojo iom aranĝita); ŝoseo (= vojo kies veturejo estas aparte konstruita kaj kapabla allasi pezajn veturilojn).

4) En la urboj oni trovas: strato (= ordinara ŝoseo inter domoj (b 2+); bulvarado (= ĉirkaŭrempara promenejo aŭ larĝa strato borderita de arboj); korso, avenuo, aleo (= larĝa strato kun arboj ambaŭflanke vicoj de arboj (b 32); placo (= libera loko aŭ spaco ĉirkaŭita de domoj); pasejo, strateto (= mallarĝa strato ofte ekzistanta en la malnovaj urboj aŭ kvartaloj); senelirejo (= vojo fermita ĉe unu ekstremaĵo, sakvojo).

5) Ŝoseo estas konstruita vojo (b 1, 3). Vojo aŭ ŝoseo estas administre : forsta, kampara, komunuma, paroĥa, distrikta, departementa, regiona, nacia aŭ landa. Destine ŝoseo estas aŭ por ĉiuj (publika) aŭ rezervita (privata). Tia rezervita ŝoseo estas cikla vojeto, rajda vojeto, aŭtoŝoseo. Aŭtoŝoseego (b 27) estas ŝoseo speciale aranĝita por rapida aŭtomobila trafiko.

6) En iu regiono, en iu lando, la vojeto estas densa aŭ maldensa, la vojaro estas longa aŭ mallonga.

### III. DIFINOJ PRI ŜOSEOJ

7) Vojareo aŭ vojsidejo (= tereno necesa por ŝoseo kaj por ĉiuj rilataj flankaj aĵoj). Vojbieno (= tereno aĉetita por konstruo de vojo, iafaĵe pli granda ol nepre necesas). Irlarĝo aŭ vojplanko (= surfaco ebena aŭ preskaŭ ebena, okupata de ĉarŝoseo (= veturejo) kaj de ŝosebordo. Gardbenketoj kaj longfosajoj (= vojkanaletoj) ne apartenas al la irlarĝo. Ĉarŝoseo aŭ firmŝoseo aŭ veturejo (= parto de irlarĝo fortikigita por veturado). Ŝosebordo (= unu el la du strioj el natura tero ambaŭflanke bordantaj ĉarŝoseon. Sur ĝin oni metas riparajn materialojn : sablon, gruzon, ŝtonetojn).

8) Trotuaro (b2 + 33) estas aranĝita bordo, ĝenerale en loĝatejo (= domaro), rezervita por piedirantoj. Randado de trotuaro estas farita el ŝtonoj hakitaj aŭ tranĉitaj, aŭ el betono, pro ŝparado eĉ el pavimeroj. La angulo de betona randado povas esti ŝirmata per angulrelo (= angula profilstango). Supraĵo de trotuaro konsistas el premita

aŭ batita natura grundo aŭ alportita tero kun aŭ sen tegajo : betono, bitumo, terpeĉo, asfalto, mezdikaj platoj el ŝtono aŭ el betono-"slaboj".

Laŭlonge de trotuaro, stratkanaletoj (= stratdefluilo) ricevas la akvon defluantan de ĉarŝoseo, de trotuaro kaj ofte de tegmentoj. Stratkanaletoj estas el betono aŭ el pavimeroj. Pluvakvo kolektita sur tegmento en pluvdefluilo (= tegmenta defluilo) falas teren tra pluvtubo kaj trapasas trotuaron tra trotuartubo por atingi la stratkanaleton.

Cikla vojeto, rajda vojeto estas ofte konstruitaj sur ŝosebordo de larĝaj ŝoseoj, kiam la (bi)ciklantoj aŭ rajdantoj estas multaj.

9) Se mankas transira kurbo sur laŭlonga profilo (b 4) inter du kontraŭaj deklivoj, estas ĝibo aŭ selo. (Voj)ĝibo ankaŭ ofte estiĝas sur ponteto pro malŝvelo de la terŝutajo ĉe ambaŭ flankoj de la ponteto. Transversa kanaletoj "sel(kanaletoj)" (b 4) en formo de platingita V kondukas akvon tra la ĉarŝoseo. Ĉar tia kanaletoj estas danĝera por rapida veturilo, kies risortojn ĝi ofte rompas, ĝi estas kiel eble plej anstataŭigita per subtera akvokondukajeto el gisfero, "enŝosea tubo, supraĵa gisakvedukto".

Tra la ŝosebordoj, flusulkoj, "trabordaj sulkoj" (b 3) eltiras akvon el randoj de ĉarŝoseo kaj kondukas ĝin al longfosajoj. La longfosajoj kolektas akvon ekster la ŝosebordo. Ĝi ofte utilas nur por limdifini la vojon.

10) Gardbenketo (b 1 8) estas konstantforma teraltaĵo (aŭ ŝtonaltaĵo) sur la ekstera rando de ŝosebordo celante senriskecon, kiam la nivelo de la irlarĝo troe superstaras la apudan grundon.

Vojtaluto (= vojglaciso) (b 1 7+) estas dekliva supraĵo aŭ de taluso aŭ de vojo en tranĉeego "kavvojo".

Vojsulko (= radsulko) estas longa kava sulko farita de pezaj ŝarĝveturiloj en vojo. Kratereto (= ŝosenesto, kotkavaĵo) estas mallonga trueto makadamo kaŭzita de rapidaj veturiloj.

Sub ŝosebordo (b 2+) estas spaco por tuboj (ofte el cimentmortero) enhavantaj kaj ŝirmantaj subterajn telefonkablojn (kp b 23). En urboj sub trotuaro aŭ sub ŝoseo estas kloako kaj akvodukto.

## IV. RAŬTO KAJ VOJLINIO.

### PREPARADO KAJ FIKSO

#### 11) Difinoj.

Laŭlonga vojprofilo (= longecprofilo) (b 4) estas desegnaĵo de vojo supoze laŭakse kaj laŭlonge (= longdirekte) sekcita vertikale. Ĝi klare montras la laŭlongajn deklivojn (= longeedeklivo) de la vojo: estas suprendeklivo, kiam iranto supreniras, tiam la vojo altiĝas; malsuprendeklivo, kiam iranto malsupreniras, tiam la vojo malaltiĝas; vojplateco, kiam la vojnivelo ne ŝanĝiĝas. Kverprofilo (b 1) estas desegnaĵo de vojo supoze vertikale sekcita per orte transversa ebenaĵo.

Por forigi la pluvakvon, oni faras kverprofilon iom arkan (= konveksarkan) (b 6). (Voj)konvekseco estas la rilato de arksago al arksnuro; ĝi estas inter 1/60 kaj 1/100. Sur ĝirejo (= vojkurbiĝo, fleksaĵo) (b 5) oni faras la kverprofilon ebena sed dekliva al centro de ĝirejo (b 6'). Tiu deklivo estas nomata laŭlarĝa deklivo (= kverdeklivo).

#### 12) Pripensado, antaŭesploro pri raŭto.

Raŭto estas la proksimuma vojlinio. Raŭton oni fiksas laŭ la kunligotaj lokoj (urboj, vilaĝoj, vidindaĵoj), laŭ la okazantaj transportoj, laŭ la traŭrata regiono kaj laŭ ties baroj aŭ obstakloj. Ne pripensite estus: elspezigi por larĝa ŝoseo sen ioma deklivo aŭ ĝirejo, se la trafiko (veturantaro) estos malgrava aŭ malpeza; aŭ konstrui tiamaniere ke la konservelspezoj estos gravaj.

13) Ĉar homo submetas la naturon nur obeante ties leĝojn, oni elektas la plej facilajn pasejojn: t.e. mont-pasejo celante transiri montoĉenon; mallarĝejo eĉ interkrutejo de valo celante transpasi riveron. Oni sekvas laŭ eble la naturan grundon por ŝpaci terŝovelon; oni evitas lokojn kun iu baro: marĉon, ŝliman aŭ torfan grundon, rokan aŭ krutan grundon, kie foso multe kostas.

La laŭlonga deklivo (b 4) ne devas superi po metro: 4 centimetrojn (1/25) sur facila vojo, 6 centimetrojn (3/50) en montaro. La radiuso de ĝirejo (b 5) ne devas subii po metro: 300 metrojn sur ebenaĵo, 100 metrojn sur monteta regiono. Plej eta minimumo de radiuso estu se eble 30 metroj en vojturniĝo (= duonturniĝo) (b 5).

Sur neĝaj regionoj: evitenda estas ĉia kavvojo (b 7) neeviteble ŝtopota de neĝo; elektenda estas deklivaĵo, kie neĝo mallonge daŭras.

Oni do provas kiel eble plej taŭge plenumi tiujn kondiĉojn, almenaŭ la plej gravajn el tiuj. Sed evidente rezultas, ke rekta linio tre malofte estas sekvebla. Kvan-kam ŝajne paradokse, rekta linio ofte kostus pli ol kurba.

#### 14) Agadoj por elekto de raŭto kaj de vojlinio.

Inĝenieroj ĉirkaŭesploras (= trapasadas) la regionon de konstruota vojo kaj helpe de rapidaj mezuroj determinas la devigotajn pasejojn, kalkulas ilian nivelon, konjektas la eblajn raŭtojn. Se ekzistas kompleta mapo de la regiono kun samnivelaj kurboj (= alteclinioj) — kiel en Francujo la originaloj de stabmapo — oni povas eĉ en skribejo konjekti sur mapo la eblajn raŭtojn. Kiam eblaj raŭtoj estas proksimume elektitaj, oni fiksas la vojlinion (= akslinion) (b 5) sur tero. En montaro sur flanko de monto gvidas linio de konstanta deklivo "samdekliva linio", linio kiel eble plej etdekliva kaj ĉiuokaze, kies deklivo subas la lime akceptitan deklivon "linio de maksimuma deklivo akceptita". Sur ebenaĵo oni provas elekti rektojn aŭ sekvi la jam estantajn vojojn; oni evitas konstruaĵojn, kies malposedigo (= eksproprieto) tro multe kostus. Mezurante la longojn per mezurbendo kun pinglegoj, la angulojn per teodolito, nivelnotante (= nivellante) per nivelskopo, aŭ farante la tuton per takemetro, oni notas la planon de raŭta regiono; oni registras la precizan nivelon de la fiksita linio, de la vojoj kaj fervojoj transpasotaj. Oni celstangas (= palisetas) la akslinion per celstangoj (= palisetoj); orte je vojlinio kaj ofte per nivelo oni registras la kverprofilejojn (b 1), kies interdistanco dependas de la reliefo de la grundo.

15) Poste en skribejo, per tiuj notaĵoj atentante ke la konstruota vojo transpasu alian vojon aŭ fervojon sam-nivela aŭ per ponto kun vertikala aperturo de almenaŭ 4 metroj, oni fiksas (b 5) la akslinion, la verticojn (= turnpunktojn), la rektojn, la ekpuntojn kaj finpunktojn de kurboj (= tangaj punktoj); oni kalkulas la radiusojn de kurboj (b 5), la suprendeklivojn kaj malsuprendeklivojn (b 4). La volumeno de terkvaranto "terŝovelaĵo" estas kalkulata helpe de kverprofilejoj (b 1). Se bezonas,

oni modifas aŭ la akklinon aŭ la deklivojn por atingi kompenson de terŝovelaĵoj : terelfos(it)aĵo devas kompensi terŝutajojn. Se ne eble, oni antaŭdeterminas lokojn, aŭ por deponi la troaĵon — tiam estas teraĵa deponejo — aŭ por preni la mankan kvanton da teraĵo — tiam estas teraĵa deprenejo aŭ terprenejo. — Konstruante aŭtoŝosegon, oni antaŭelektas kunigvojojn (b 27) kun transpasotaj vojoj.

16) Finfine la vojlinio estas difinita sur plano. La vojo traŝos grundon, enteriĝos en kavvojo (b 7), iros super apuda natura grundo sur taluso (= terŝutajo) (b 8), transpasos riveron sur ponto (b 4), iafoje subteriĝos tra tunelo (b 26), tra duonsubtera galerio. La pontospecoj (b 12-25) estas elektitaj laŭ regionaj materialoj, laŭ transsaltita malpleno (= spano, pontpaŝo), laŭ akceptotaj pezaj de ŝarĝitaj veturiloj.

Tom longdaŭraj kalkuladoj, grafikaj desegnaĵoj necesas por kontroli ĉu ĉe la pli danĝeraj punktoj de ĉiu artvirko (= tekna virko, artlaboritaĵo) la peno spertita de uzotaj materialoj ne superos la akceptitajn limojn de rezisteco kontraŭ tiro, fleksrompo, premo, tordo, tranĉo. Tiu limo estas pro senriskeco ono de elasteca limo.

## V. GENERALAĴOJ PRI KONSTRUADO

17) Por la konstruo estas necese :

- a) fari irlarĝon (b 1) de estonta vojo per terŝovelo.
- b) konstrui artvirkojn.
- c) konstrui ĉarŝoseon.

Terŝovelo estas terforigo, kiam oni forprenas teron el natura grundo, farante kavaĵon; kaj teralporto, kiam oni alportas teron, farante amason. Terforigo sur tuta vojlarĝo estigas kavvojn (b 7), teralporto estigas taluson (= terŝutajojn) (b 8). Kiam sur iu parto de sia longo, vojo estas fosita (= kava) kaj aliflanke estas talusa, tiu longo estas en miksprofilo (= miksprofilo) (b 1).

## VI. TERŜOVELO

18) La terfoso estas farata laŭ la firmeco de grundo : per ŝovelilo en sablo, per (pik)pioĉo aŭ pikilego (b 31) en sintenema grundo, per minstango aŭ roklevilo en mez-

mola roko, per eksplodema substanco en malmola roko. Por eksplodigi, oni uzas brulŝnuron ofte sekuran, prajmon (= eksplodigilon) kaj eksplodemajon. En sufiĉe mola grundo, okaze de grava terforigo, oni uzas fosmaŝinon. Kiam profundeco superas 16 metrojn, oni anstataŭigas kavaĵon per tunelo (b 26).

Kavvojn (b 7) oni fosas diversmaniere laŭ profundeco kaj speco de grundo. Por kavaĵo ne profunda, oni tutlarĝe forigas teron tavolo po 0,4 ĝis 0,5 metro. Por kavaĵo pli ol 3 metrojn profunda oni fosas laŭ tavolo "etaĝo" 3 metrojn alta. Je ĉiu etaĝo oni fosas mezan tranĉeon profundatan je 3 metroj, sufiĉe larĝan por la ŝarĝveturiloj transveturigantaj la terelfositaĵojn. Oni plilarĝigas tiun tranĉeon ĝis tutlarĝo de la etaĝo. Poste oni same faras pri la tuj suba etaĝo ktp.

19) Iufoje necesas subteni la tranĉepariojn, kiam oni fosas (b 9). Se necese, oni tabulizas t.e. oni metas sur la tranĉepariojn tabulojn pli malpli krudajn : "basttabulojn", kiujn per plandtabuloj flanketenas apogilpecoj aŭ dispuŝaj pecoj (= kverpecoj) kojnumitaj inter la tabuloj de du kontraŭaj parioj.

Se la grundo estas sinten(em)a aŭ roka, oni fosas sapeas (b 10) : tranĉinte fronton kiel eble plej altan kaj vertikalan, oni subfosas ĉe malsupro, oni sapeas. Poste oni helpas la falon de la sapeita bloko enigante en teron malantaŭ la fronto dikajn palisojn kaŭzontajn fendojn kaj falon. En roka grundo, por ricevi tiujn suprajn fendojn, oni boras truojn per mana boraparato, per bormaŝino aŭ per minstango. En la truojn de la roko oni puŝas per martelego kojnojn el malmola ligno dilatigontajn per akvo. En roko aŭ en kiu ajn alia grundo oni ŝtopas la truojn per eksplodemajoj eksplodigotaj.

20) La terelfositaĵoj tiel ricevitaj estas transportataj al ŝtopotaj lokoj : ĝis distanco de 4 metroj per ŝovelilo; ĝis 75 metroj per ĉarumo. Sur pli granda distanco oni uzas jen ŝarĝoĉaron prefere deŝutivan, jen ŝarĝaŭton (= kaminon), jen vagonetojn sur trako ĝenerale etŝpura. Tiuj vagonetoj estas trenataj de homo aŭ de ĉevalo aŭ de lokomotivo vapora, elektra, premaera.

Kiam la alto de taluso superas 30 metrojn, oni anstataŭigas taluson per viadukto (b 34).

21) La parioj de fosajo estas ĝenerale duonorte deklivaj



(45 gradoj) en ordinara grundo (b 17). Ili povas esti preskaŭ vertikalaj, krutaj, apikaj en grundo roka aŭ kompakta (= ne disigema, sintenema). La supraĵo de taluso "taluto" (b 1) estas dekliva je 2/3 de orto rilate al horizontalo.

Kiam tia deklivo estas krutigenda por etigi vojareon (b 8) oni uzas muron ĉu preskaŭ vertikalan "apogmuron (= talusan retenmuron) aŭ iom klinan "talutan" talusmuron" kun aŭ sen murapogiloj (= pilastroj); aŭ oni konstruas sur taluto senmorteran ŝtonvirkon (= talutan talusmuraĉon) kun aŭ sen arkadoj (b 45). Tiuj estas jam artvirkoj.

Se subtera rivero ŝprucas sur taluto, oni provas kolekti la akvon en dreniloj (= drenujoj) (b 7). Drenilo estas laŭlonga, se ĝi estas lokita ekster la kavaĵo kaj al tiu paralela; ĝi estas transversa, kiam la drenilfaŭko aperturnas (= malfermiĝas) sur taluto kaj kiam la drenilo profunde penetras en la taluson.

22) Se la bazgrundo estas mola, ŝlima, disigema, antaŭ ol ŝuti ŝovelaĵon por taluso, oni forigas ŝlimon, disigemaĵojn ĝis konvenaj profundo kaj larĝo, ĉu por anstataŭigi ĝin per sablo "sabla balasto", ĉu por estigi fasĉinvirkon t.e. preme meti vicojn da branĉofaskoj "fasĉinoj" aŭ por preme sterni simplan pajlon; tio, por ke la premo de vojo agu sur pli granda areo, do ne senteble efiku sur grundo.

## VII. ARTVIRKOJ. ĜENERALAJOJ

23) Por la artvirkoj oni uzas virkŝtonojn (= konstruŝtonojn) interŝtope ĉemetitajn :

a) sen mortero : senmortera ŝtonvirko (aŭ simple ŝtonvirko).

b) kun mortero : masonaĵo. Mortero konsistas el ĉerato "la sablo" kaj el gluanto "cimento, kalko grasa aŭ hidraŭlika".

Ŝtonoj estas antaŭe preparitaj

a) tranĉitaj sur tuta surfaco kaj grandaj : "tranĉitaj ŝtonegoj"

b) tutsurface tranĉitaj sed ampleksaj je malpli ol 0,4 metro : "tranĉitaj ŝtonoj"

c) hakitaj nur sur vidota supraĵo : "hakitaj ŝtonoj".

d) ne hakitaj sed tiaj kiaj la ŝtonoj estas elfositaj el ŝton(elfos)ejo: "krudaj ŝtonoj, ordinaraĵ virkŝtonoj, konstruŝtonoj".

24) Ŝtono estas anstataŭebla per briko, farita el argilo pistita, knedita, preme muldita kaj bakita; aŭ per betono, miksaĵo batita en muldilo de cementmortero kaj de ŝtonetoj. Pli kaj pli oni uzas armitan cimenton, armitan betonon (b 23). Ŝtala armaturo estas lokita en muldilaĵo, kiun oni ŝtopas per mortero aŭ betono ŝutita, premita, batita. La metalo kontraŭstaras la tiron (= streĉon) dum la betono aŭ la mortero kontraŭstaras la premon.

25) Artvirko (= tekna virko, inĝeniervirko) estas konstruaĵo el ŝtonoj, masonaĵo, cemento, betono, ligno aŭ metalo en publika laboro. Tiaj estas klina ŝtonvirko (b 45), senmortera dekliva ŝtonvirko (b 15) (= talusmuraĉo), apogmuro (b 8) (= talusa retenmuro), kloako (b 2), tunelo (b 26), ajna ponto.

Senmortera dekliva ŝtonvirko (b 15) estas sur deklivo suba je 1/1 : muro el krudaj ŝtonoj zorge interŝtope ĉemetitaj sen mortero, do kun neŝtopitaj juntoj. Per tia ŝtonvirko oni ĝenerale garnas la talussupraĵon "taluto", uzante ĝin kiel ŝirmilon.

Por flanketeni la taluton de kavvoĵo aŭ de taluso, kiam la natura terdeklivo superas la akcepteblan talutdeklivon (= 1/1 pri kavaĵo, 2/3 pri taluso), aŭ kiam oni devas etigi la vojareon, oni uzas apogmuron (b 8) aŭ klinan ŝtonvirkon (b 45) iufoje plifirmigitan per pilastroj. La diko de apogmuro, kalkulita por kontraŭstari la puŝon de retenata tero (precipe de tero malseka) kaj la puŝon kaŭzitan de veturantaj ŝarĝoj, estas ĉiam granda : minimume 0,7 metro ĉe supro kun dikkresko (= plidikiĝo) je 0,1 metro po malsuprena metro. Necesas lasi je regula interspaco flutruojn por ke subtera akvo povu eliĝi. Klina ŝtonvirko estas apogmuro el ŝtonoj sen mortero; ĝi estas iom pli dika ol apogmuro de sama alto.

26) En urboj sub trotuaroj aŭ sub ŝoseo estas konstruitaj kloakoj (b 2+), kiuj estas subteraj tuboj aŭ subteraj masonitaj galerioj. La stratkanaletoj (= stratdefluilo) ricevas la pluvakvon de ĉarŝoseo, de trotuaro kaj ofte de tegmentoj de apudaj domoj. Ĉe la malsupra loko de stratkanaletoj, kien la akvo alfluas, tie estas kloakfaŭko, tra kiu falas la akvo en la kloakon. La kloakfaŭko kaj la

suba aŭ apuda masonaĵo estas kloakfaŭkaĵo. La eniro de laboristoj en kloakon sufiĉe grandan ("enirebla kloako") estas ebla dank'al kloakaperturoj.

27) Prae oni trapasis riveron ĉe (tra)vadejo. Pli oportuna por iranto estas ponto. Ponto estas artvirko live-ranta daŭran kaj facilan komunikon inter du lokoj apartigitaj de iu baro. Kiam la spano subas 1,5 metrojn kaj servas nur por paso de akvo, oni nomas ĝin akvedukto (b 11). Se akvedukto konsistas nur el simplaj cimenttuboj, gisferaj tuboj aŭ ferladaj tuboj, oni nomas ĝin tubakvedukto. Se ĝi konsistas el du masonitaj muretoj subtenantaj mezdikajn platojn el ŝtono aŭ el betonaj "slaboj", ĝi estas slabakvedukto (= skatola akvedukto). Akvedukto povas esti farita tute el masonaĵo kaj havi volbon "ŝtona arkaĵo"; tiam ĝi ne diferencas de ponteto krom per sia pli eta spano.

Ponteto estas ponto, kies spano interas 1,5 kaj 4 metrojn. Ponto estas artvirko transpasanta ununuran baron kaj kies spano superas 4 metrojn. Se ĝi estas tre alta aŭ tre longa aŭ se ĝi transpasas plurajn barojn, ĝi estas nomata viadukto (b 34). Pontfaŭko estas areo liverita por trapaso de akvo.

28) Ponto (b 12-36 estas fiksa se ĝi estas nemoveble konstruita; ponto estas movebla, kiam suba pasejo devas esti intertempe laŭalte libera.

Laŭ la maniero uzata por liberigi la suban pasejon, movebla ponto estas jena: turniĝanta "turnponto", se la ponto turniĝas ĉirkaŭ vertikala akso "pivoto"; ruliĝanta "rulponto", se ĝi malantaŭen forŝoviĝas; leviĝanta "levponto", se la ponto aŭ parto de ponto leviĝas ĉe unu ekstremaĵo, dum la alia ekstremaĵo turniĝas ĉirkaŭ horizontala akso; baskula "baskulponto", se tiu lasta akso ne estas ĉe ekstremaĵo; "lifto", se la tuta ponto translacie leviĝas, dum la planko restas horizontala; "iranta" (= transportanta ponto aŭ pendita pramo), se mallonga irplanko alilokiĝas de unu al alia bordo pendanta de unu ĉaro, kiu ruliĝas sur tre altnivela trabo.

Laŭ la angulo kun la transpasata baro, ponto estas orta aŭ oblikva. Laŭ la formo, ponto estas arka (b 12 21), pafarka (b 18), rekttraba (b 18), ekvilibra (= argana, kantilevra) (b 35), penda (b 25). Laŭ uzitaj materialoj, ĝi (estas farita) el masonaĵo (b 12+ 15), el armita betono (b 23),

el metalo (b 18 21), el ligno (b 36).

29) Ponto konsistas el elstaranta (= superpendanta) parto "spanaĵo (= superelstarajo) (b 21) aŭ arka aŭ rekta". La irajo tretita de irantoj kaj subpremita de veturiloj estas la pontplanko (b 23 36). La pontplankon subportas la pontferdeko (b 17+), kiu konsistas el partoj sur abutmentoj aŭ sur pilieroj kaj el spanaĵo.

Pontferdeko apogiĝas sur firma grundo pere de ekstremaj masonblokoj (b 18) "abutmentoj", kun iufoje unu aŭ pluraj interaj subportiloj: "pilieroj" el masonaĵo, subportantaj ĉarpentaĵoj "pontstablegoj" el ligno (b 36) aŭ el metalo.

## VIII. ŜTONPONTOJ

30) La arkaĵoj kuŝas per siaj ekstremaĵoj sur blokoj el masonaĵo aŭ el betono: tia bloko estas abutmento ĉe ekstremoj de ponto, piliero en interspaco. Abutmento aŭ piliero staras sur fundamento (b 12-18).

La fundamento (b 12) estas la enteraĵo de la bazo de tiu bloko. Ĝi estas farita el ordinara masonaĵo aŭ el betono, staras sur firma grundo aŭ senpere aŭ pere de palisoj. Ĉe malgranda ponto, fundamento ofte kuŝas sub tuta ponto "ĝenerala fundamento, tutflueja plandumo" (b 11 15). Oni borderas en fluejo la fluejan plandumon almonte kaj alvale per unu aŭ kelkaj vicoj da tranĉitaj ŝtonoj, virko nomata plandumgardilo (= kurtena sojlo) (b 15). Se ĝenerala fundamento ne estas konstruita, la fundamento estas gardita kontraŭ la disigema akvoefiko (=erozio) aŭ la kirliĝo de akvo per amaso da ŝtonegoj espereble ne moveblaj de akvo kaj rompantaj la puŝforton de akvo-"ŝtonegaĵo" (b 12).

31) Por atingi firman fundon en tero, oni faras fosajegon, kies pariojn oni apogas se bezone per apogiloj "apogstangoj, apogtraboj" (kp b 9). Se oni devas fosadi en akveca grundo aŭ en akvo mem — kiel okazas por piliero — oni ĉirkaŭigas la estontan fosajegon per akvo-baranta zonaĵo, kiu estas ĉirkaŭdigo, mergkestego, keŝta digo (= keŝta akvobarilo). En tiu zonaĵo oni elpumpas akvon per efikega pumpilo, tiel ke laboristoj povu labori seke. En akvo ne profunda kaj kvietaj oni povas konstrui ĉirkaŭdigon el tero, fortigitan aŭ ne per palisoj. Kasono (= mergkestego) estas akvimuna keŝtego ĝenerale el

ferlado, kiun oni trenas ĝis taŭga loko kaj malsuprenigas ĝis grundo. Kun supra planko ĝi estas premaera kasono; kun funda planko ĝi estas fundkasono (b 14). Pli ofte oni estigas kestegon, "kestan digon", enigante en grundon per martelego dikajn palisojn kape ringizitajn, interspace po 1 metro. Kunligante ties suprojn, "vertojn" per duobla trabeto "tenajla trabeto", oni ramvandezas, t.e. enigas tra la spaco inter la du partoj de la tenajla trabeto kiel eble ĉemetitajn tabulegojn, "ĉeajn tabulegojn", kies piedo estas klinranda "bevula piedo": ramtabulego, rampaliso, ramdilo. Oni haltigas enfluan de akvo ŝtopante la fendetojn inter la tabulegojn per argilo, sterko aŭ stupo. Oni ankaŭ povas fari, ramante kiel ĉi supre, du vandojn, kies interspaco oni ŝtopas per argilo aŭ glua tero. Por ampleksa kesta digo oni uzas ŝtalajn ramtabulegojn (b 44) rande havantajn laŭlongajn flangojn, unu viran, unu inan. Ramante la unuan ŝtalan tabulegon, oni ramas la duan eniginte en la flangon de la unua la aliseksan (= kompletigan) flangon de la dua.

32) Se la firma fundo kuŝas profunde, oni fosas izolajn ŝaktojn ŝtopotajn per masonaĵo; tiel fariĝas kolonoj servontaj kiel subtenostegoj. Se atingi firman fundon estas tro koste aŭ neeble, ĉar la firma grundo kuŝas tro profunde, oni ramadas per rammaŝino palisojn lignajn, metalajn aŭ betonajn (b 12), — kies kapo estas ringizita per ringo — ĝis tiuj tuŝas firman grundon. Aliaokaze la palisoj per si mem kaj per sia proksimeco fortikigas grundon, aŭ dank'al froto de siaj surfacoj sur grundo eĉ mola, fakte ne moviĝinte kontraŭstaras la surmetitajn ŝarĝojn. Ĉe supro de palisoj oni verŝas betonon malliberigantan la paliskapojn. Sur tiu betonaĵo "betonplando" (b 12), oni konstruas abutmenton aŭ pilieron.

33) Abutmento (b 13 15) estas ekstrema subportantaĵo de ponto. Ĝia videbla surfaco konsistas el tranĉitaj ŝtonoj dum ĝiaj anguloj estas faritaj el tranĉitaj ŝtonegoj. La vertikala stako de angulaj tranĉitaj ŝtonegoj estas la angula ŝtonstako (= angula pilastro). Ties plej altnivela ŝtonego ricevanta volbon estas impoŝto (= impoŝta ŝtonego). La horizontala vico de impoŝtoj, super kiu komenciĝas "naskiĝas" la volbo (b 12), estas impoŝta ŝtonegaro. Se ĝi elstaras, ĝi estas abakajo.

34) Piliero (b 12 18) estas intera subportantaĵo de ponto.

Ĝi havas ofte antaŭaĵon "pilierbekon", kies pinto tranĉas akvon.

Arkaĵo (b 12+ 15) estas arkforma parto sur malpleno. La arkaj partoj videblaj demonte aŭ devalde "la volbkapoj" (= arkajkapoj) estas faritaj el tranĉitaj ŝtonegoj nomataj doveloj. La meza dovelo estas la fermdovelo (= ĉefa dovelo, supra dovelo). La dovelo kuŝanta sur impoŝto estas la baza dovelo.

Inter la du arkajkapoj, troviĝas la volbo, kies surfaco de sube videbla estas daŭlo (= volbosubo). Por volbo oni uzas ĝenerale hakitajn ŝtonojn t.e. "dovelaĉoj, volb-ŝtonoj". La nevidebla supraĵo de volbo estas la volbosupro (b 12). Ĝin tegas likimuna volbkovrilo el cemento aŭ el asfalto baronta la likadon (= tragutado, penetro) de la akvo.

35) Spano (b 12 16) estas horizontala longo inter impoŝtoj (b 13 15). Arksago (b 16) estas vertikala alteco de fermdovelo super la horizontala ebena enhavanta la naskiĝejojn de arkaĵo "naskiĝebeno" (b 12).

Arkaĵo aŭ volbo ricevas nomon laŭ sia daŭla kurbo (b 16): duoncirkla; cirkklarka (= subcirkla) se arksago subas duonspanon; supercirkla se arksago superas duonspanon; elipsa; ansa (= korbansa) se kurbo de volbosubo "daŭla kurbo" konsistas el pluraj cirkklarkoj havantaj saman taŭganton ĉe kontaktpunktoj; ogiva (= pintarka). Tiu lasta volbo postulas iom grandan altan.

36) Kiam volbosupro estas horizontala, volbo (= arkaĵo) estas platdorsa (= lintela) (b 41). Ĉe subcirkla volbo (b 16), konveks(eco) estas la rilato: arksago sur spano. Praktike ĝi valoras inter 1/3 kaj 1/10.

Sur volbon (b 13 15 40) oni ŝutas teraĵon aŭ betonon sen multe da cemento "malgrasa, malriĉa betono" ĝis horizontala ebena. Kapmuroj (= timpanoj) konstruitaj sur volbkapoj flanke subtenas tiun amason super volbo. Sur abutmento tiu amaso estas subtenata per muroj "retenmuroj", se tiuj muroj estas samdirektaj kiel timpanoj; "alomuroj" se ili estas pli malpli samdirektaj kiel abutmentpiedo (= vangmuro).

Parapetoj el tranĉitaj ŝtonegoj borderas ambaŭflanke ponton kaj malhelpas, ke iranto falu de ponto.

Sur videblaj surfacoj, oni ŝtopas juntojn per ordinara mortero "juntoŝtopo". Simila laboro farita post masonado

per grasa cimentmortero (= cimentriĉa mortero) estas junta postŝtopo (= junta finŝtopo). Oni glatigas per glatigilo (= juntotrulo).

37) Por konstrui volbon, oni muntas lignan arkaĵon "cintro, modeltruso" (b 37) fortike subtenitan per kelkaj trusoj sur fostoj pere de kojnoj aŭ sabloskatoloj. Cintro konsistas el planko, kronpecoj, ligdiloj ĉefaj kaj malĉefaj, tenfostetoj, tenfostoj, tirtrabo ofte tenajla, kontraŭventaj pecoj. Sur tiun cintron, masonisto demetas la dovelaĉojn de la volbo. Oni finas tiun masonaĵon ĉe fermdeveloj per volbkejlaj ŝtonoj (b 13), fermante "kejlante" la volbon. Aŭ tuj post volbfermo "kejlado", aŭ post tempo sufiĉa por firmiĝado (= hardiĝo) de mortero, oni forigas cintron, "forcintras".

Trotuaroj (b 2 33) rezervitaj por piedirantoj estas ĝenerale faritaj el batita teraĵo tegita aŭ ne. La tegajo povas esti: planko cimenta, betona aŭ asfalta (diko suba je 0,05 metro); slabaro (kun ĉemetitaj slaboj); slabajo (dika unupeca tegajo) el ŝtono, el betono. Randaĵo el tranĉitaj ŝtonoj limigas trotuaron ĉe borda ĉarŝoseo. Laŭlonge de malpleno estas parapeto (b 8 13), kiu konsistas el (parapetaĵ) soklo, fusto, pormana surfusto.

## IX. METALPONTOJ

38) Ili estas faritaj el fero, gisfero aŭ ŝtalo (b 17+ 22 25 35); laŭ formo de ĉeftraboj, ili estas arkaj aŭ rekttrabaj; laŭ pendeca aranĝo, ili estas pendaj, ekvilibritaj (= kantilevraj, arganaj); laŭ rilata nivelo de planko, ili estas mezplankaj, supraplankaj, malsupraplankaj (pri fervojo: meztrakaj, supratrakaj, malsupratrakaj).

Gisfera ponto estas necese arka, tial ke gisfero sekure malcedas (= rezistas) nur kontraŭ premo. Ponto el fandmaldita ŝtalo "gisŝtalo" kiel ponto Aleksandro III en Parizo estas samtipa.

39) Arka metalponto (b 21) konsistas el arkaj ĉarpenataĵoj "arkaj trusoj" ĉiuj paralelaj, kunligitaj per traboj. Inter tiuj trusoj, la kontraŭventaj kontraŭstaras la puŝon de vento kaj konservas la interspacon. La arkaj trusoj subtenas per vertikalaĵ metalfoŝtoj la horizontaltajn trabojn sur kiuj kuŝas la pontplanko "longepecoj, laŭlongaj traboj". Por helpi kontraŭ dilato, la arkoj havas

artikojn ĉu nur ĉe subportejo aŭ kune ĉe subportejo kaj ĉe fermejo.

40) Ferponton aŭ ŝtalponton subtenas ĝenerale (b 18) abutmentoj el masonaĵo kaj interaj subportiloj "pilieroj el masonaĵo, gisferaj kolonoj, feraj stablegoj" kp (b 36). Ĝustasence ponto aŭ pontferdeko (b 17) konsistas el ĉeftraboj (randaj kaj mezaj) kunligitaj per kvartraboj (= orte transversaj traboj), subtenantaj trabetojn laŭlongajn kaj laŭlarĝajn.

41) Ĉeftrabo estas:

a) simpla por eta spano subanta 4 metrojn: I-trabeto (= I-relo) (kp b 38) aŭ ĝemeltrabo el I-reloj.

b) malsimpla (= komponita) (b 19) "platar/trabo, ladar/trabo, plenalma trebo"; ĝi konsistas el meza lado "almo" vertikala kaj ĉe ties ekstremaĵoj el membreaĵoj (= trab/plandaĵoj) kaj kunnititaj angulreloj. Ladoj ebenaj en formo de orta triangulo "angulladoj" rigidigas angulojn. Vertikalaj ripoj el angulreloj je regula interspaco firmigas tiun ladartrabon. Du apudmetitaj ladartraboj konsistigas skatoltrabon.

Se alto de ĉeftrabo devas superi 1,5 metrojn, oni uzas kradtrabon, trusorman trabon aŭ latistrabon (b 18 20), kiuj konsistas el membreaĵoj supra kaj malsupra, ĉiu membreaĵo el almero kaj el feraj larĝlatoj "trabplandaĵoj" kaj el angulreloj. Membreaĵojn firme kunligas vertikalaĵ ferfostetoj (el kvar angulreloj) kaj oblikvaj ferstangoj "diagonalstangoj, skarpstangoj" el ferlato aŭ el angulrelo. Enŝovitaj pecoj "ŝtoppecoj" se necese faciligas kunigon de pecoj.

Sur la kvartraboj (b 17), oni metas aŭ plankon el lignaj tabulegoj (aŭ diloj), sur kiuj iras la cirkulantaro, aŭ ferladojn, "ondladojn aŭ premformitajn ladojn". Sur tiujn ladojn oni sternas malgrasan (= malriĉan) betonon aŭ malpezan rubon aŭ skoriaĵon; poste oni ŝutas ŝtonetojn rulcilindrotajn.

42) Por ke dilato ne difektu ponton, oni zorgas ke tiu dilato okazu per dilat/aparato (b 22) ĝuste sub ekstremaĵo de ĉeftrabo: frotplando (= apogplando) aŭ dilatulaĵo; kaj, se spano superas 25 metrojn, dilata rulĉareto. Tiuj dilataparatoj glitas aŭ ruliĝas sur glitselo fiksita sur subportantaĵo, "subporta ŝtono".

Flanke de la ĉarŝoseo kaj 0,15 metron pli altnivele ol la

ĉarŝoseo, oni konstruas la trotuarojn (kp b 23 38), ĉu samajn kiel tiujn de ŝtonponto, aŭ el reliefstrekita (= nervura) ŝtallado. Se trotuaro situas ekster la randaj ĉeftraboj, konzoloj subportas ĝin, "korbela trotuaro" (kp b 23).

43) Pontobalustrado (b 39) ŝirmas kontraŭ falo. Ĝi konsistas el unu vico da kolonetoj aŭ fostetoj kunigitaj supre per horizontala stangeto "manrelo, supra gardrelo". Duonaltece estas meza gardstango; anstataŭ meza gardstango, la interspaco de fostetoj ricevas ĉu kradeton (= stangetvirko) aŭ krucigantajn stangetojn "krucvirko, latiso" (b 39 39'). Pro deviga alto de pontobalustradoj, oni anstataŭigas tiujn per malsimplaj ĉeftraboj, kiuj tiam staras ambaŭflanke de pontferdeko kaj ne plu estas fiksitaj sub pontferdeko (kp b 23 36). Se tiaj flankaj ĉeftraboj estas tiel altaj, ke oni povas kunligi ilin supre per kvertraboj, oni havas skatolponton. Se planko kaj plafono de skatolponto estas samaj, oni havas tubponton (b 35').

44) Ofte ĝis spano de 6 metroj oni konstruas ponton el multaj I-reloj iom proksimaj, enmetitaj en betono "enbetonigitaj": ponto el en(metit)-aj (= enbetonaj) I-reloj" (b 38).

## X. LIGNOPONTOJ

45) Lignoponto (b 36) estas preskaŭ ĉiam provizora, kvankam ekzistas en montaraj regionoj, pro malmulte-kosteco, daŭrantaj, (= definitivaj) lignopontoj. Tutligna ponto estas fosta ponto aŭ stabloponto, kiu staras sur enakvaj fostoj.

Sur la abutmentoj kaj la pilieroj (ĝenerale el masonaĵo) kuŝas la ekstremajoj de la ĉeftraboj (kp b 18). Sur la ĉeftraboj kuŝas kvertraboj, kiuj subportas tabulegojn aŭ dilojn formantajn la pontoplankon. Sur la pontoplanko iras la cirkulantaro.

Flanke balustradoj (kp b 39) el ligno gardas la irantojn kontraŭ falo. Interaj subportiloj el ligno estas nomataj stablegoj.

46) La ĉeftraboj estas simplaj ĝis spano de 4 metroj. Oni pligrandigas la eblan spanon ĝis spano de 7 metroj per bordaj (= abutmentaj) subtraboj; ĝis 10 metroj per

bordaj subtraboj kun oblikvaj apogtrabetoj; ĝis 20 metroj per mezaj subtraboj. Ĉiu subtrabo estas firme ligita al ĉeftrabo per feraj ans'ligiloj aŭ per krampoj. Kiam temas pri spano superanta 20 metrojn, ankaŭ por ŝpari lignovolumenon, oni uzas malsimplajn ĉeftrabojn. Tia ĉeftrabo similas metalan kradtrabon: vertikalaj fostetoj, oblikvaj stangoj kaj horizontalaj membraĵoj kunligitaj per boltoj, iufoje per najlegoj. Sed tie la membraĵo konsistas nur el pluraj vertikalaj tabuloj kunboltitaj, ĉar ne ekzistas lignaj angulreloj.

47) La lignaj malsimplaj ĉeftraboj estas armitaj, kiam feraj aŭ ŝtalaj stangoj estas uzitaj anstataŭ kelkaj lignaj, ĝenerale la tirataj. Balustradoj estas samaj kiel tiuj ĉe metalponto. Kiel ĉe metalponto, ili povas servi kiel ĉeftraboj.

Por ke la lignaj traboj aŭ lignaj stangoj konservu sian tutan reziston, oni neniam etigas ilian profilon, sed oni almetas aŭ surmetas la lignajn pecojn unu kontraŭ la alia, se bezone enŝovante ŝtoppecojn. Boltoj premas sufiĉe por solidarigi la ĉemetitajn tabulojn.

## XI. BETONPONTOJ

48) Betono uzata por ponto postulas bonegkvalitan cimenton kun sendifekta kaj ne fuŝita farado. Diko kaj dimensio de ferstangoj aŭ ŝtalstangoj enmetotaj en betonon (= enbetonigitaj) "armaturo" estas zorge kaj ekzakte kalkulitaj por rezisti kontraŭ la streĉfortoj (= tirfortoj).

Unue oni muntas ĉarpentaĵojn subtenontajn muldilaĵojn, en kiujn oni lokas ferstangojn. Versinte betonon, oni batas ĝin per manbatilo aŭ batmaŝino aŭ vibri(g)maŝino (= vibratoro).

49) Betonponto (b 23) estas rekttraba aŭ arka (= arktraba). Rekttraba betonponto havas samajn erojn kiel lignoponto: ĉeftrabojn, kvertrabojn. Anstataŭ ligna planko estas betonplanko. Sed tiuj eroj ne estas devige surmetitaj unu al alia; kontraŭe, se supraĵo de ĉiuj eroj estas en sama ebena, oni estigas enfiksaĵojn, kiuj efikigas pli fortikan rezistokapablon. Tipa betonpeco estas slabo kun reliefstrioj.

50) Pro facilrompiĝo de betono (tio, kio estas danĝera, kiam betono utilas por fortikeco de ponto) betonslabo ne

estas senpere premita de cirkulantaro, sed ricevas tertavolon, sur kiun oni ŝutas ŝtonetojn.

Arka betonponto havas samajn erojn kiel arka metalponto (kp b 21) : arkajn trabojn unuarkikajn aŭ triarkikajn, fostojn starantajn sur arkaj traboj kaj subportantajn pontferdekon. Pontferdeko el longepecoj, kvertraboj kaj betonslabo similas ferdekon de rekttraba betonponto; sed longepecoj estas pli etaj, ĉar spaco estas nur la interspaco de du fostoj.

## XII. PENDPONTOJ

51) Kiam spaco estas tro granda, kaj kiam pro tieaj kaŭzoj ne estas eble konstrui interajn pilierojn, oni konstruas pendponton (b 25). Ĉe ambaŭ abutmentoj estas portalegoj subportanta ĉefkablojn (= tenkabloj) el multaj ŝtaldrajtoj. La ekstremaĵoj de tiuj kabloj ekstere de la portalegoj "fiksad/kabloj" estas fiksitaj sur ankrajaj stangoj lokitaj en betonblokoj sufiĉe pezaj.

Super la malpleno, la ĉefkabloj portas vertikalajn pendstangojn regule interspacigitajn, kies malsupro portas anson. En la ansoj pasas la ekstremaĵoj de kvertraboj lignaj aŭ ŝtalaj. Sur la kvertraboj kuŝas laŭlongaj trabetoj subportantaj plankon, kie iras trafiko.

Por etigi flekseblecon de pontferdeko, oni almetas oblikvajn kablojn. Tutajo de kabloj kaj stangoj konsistigas la pendigilaron (= pendvirkon). Nun oni emas konstrui pendpontojn kun rigida pontferdeko. Tiam la kabloj estas oblikvaj kaj la pontferdeko ofte estas el betono.

## XIII. FLOSPONTOJ. PRAMOJ

52) Sur larĝaj riveregoj, oni estigas iufoje flosponton aŭ barelponton : pontonoj, boatoj aŭ bareloj regule interspacigitaj servas same kiel pilieroj por subporti la pontferdekon. Kompreneble oni aranĝas artikon ĉe ĉiu subportanta pontono. Sur la ponto mem, ĉe loko nomata trapasejo, unu aŭ kelkaj pontopartoj "spanaĵoj" estas formoveblaj por ebligi liberan momentan trairon de ŝipoj, eĉ de mastŝipoj.

53) Kiam konstruo de fiksa ponto, eĉ de flosponto estus tro kosta, oni estigas pramon. Pramo estas granda platboato, kies ferdeko taŭgas por preni homojn, bestojn,

veturilojn transveturigotajn de unu bordo al la alia. Sur riveroj, anstataŭ unu granda platboato, oni ŝpare uzas du ordinarajn boatojn kunligitajn per ligna ferdeko. Tiel ekvilibro estas pli starema (= stabila) kvankam sen larĝa boato.

Pramo translokiĝas aŭ per motoro movanta helicon (aŭ padelradon), aŭ per ŝnuregiritado. Ŝnurego estas elstreĉita super rivero per bordaj ĉarpentaĵoj "stabilegoj", aŭ ĉeno estas mergita. Kiam ĉeno estas fiksitaj en fundo de rivero per ankrilo, tiam la boato iras cirkle.

54) Memira pramo estas pramo, kiu apogante sin sur ŝnurego aŭ sur ĉeno alilokiĝas fare de riverfluo per konvenaj direktoŝanĝoj.

La albordego de pramo estas speciale aranĝita por ebligi albordego kaj facilan pason de veturiloj, de la bordo sur pramon kaj inverse. Generale oni konstruas masonitan kajon aŭ ferdekon sur palisaro "varfo". Iufoje oni konstruas ilin samdeklivaj kiel la ekstremaĵo de pramo.

## XIV. TUNELOJ

55) Tunelo (b 26) estas subtera galerio borita tra monto. Oni malofte uzas tunelon, ĉar ĝi multe kostas :

a) pro konstruo ĉiam malfacila, ĉu pro roka grundo, ĉu pro sabla disfalema grundo, ĉu eĉ en ordinara grundo, ĉar necesas ke oni per ĉarpentaĵo (b 42) subtenu ĝis masono.

b) pro aerumado, stariganta malfacilan problemon, ĉu tro blovas, ĉu ne sufiĉe blovas.

c) pro lumigado.

Tunelo estas : tute cirkla, tute elipsa (ankaŭ ovoforma), aŭ nur la plafono estas arka. Tunelsurfaco ricevas masonitan tegafon konsistantan el :

a) malsupra parto "plandumo, kontraŭvolbo".

b) du muroj proksimume vertikalaj, kies surfaco estas ebena aŭ kurba "piedmuroj, submuroj".

c) supra parto "volbo".

56) Tie ĉi kaj tie laŭ pli malpli regula interspaco oni aranĝas truojn ĉe malsupro de piedmuroj "flutruoj", tra kiuj eliĝas la akvo trasorbigitaj el tero (kp b 8).

Por konstrui tunelon, oni kavigas (= fosas) trapezan galerion mezdimensionan (ĉirkaŭ 2,5 × 2,5 metrojn) kaj oni framsubtenas (b 42 47). Uzata ĉarpentaĵo konsistas el

horizontalaj tabuloj subportitaj ĉe tunelsurfaco per vertikalaĵoj interspacigitaj laŭ firmeco (= sintenemo) de borita grundo. Tia framo konsistas el du fostoĵoj metitaj sur malsupra transversa horizontala trabo "framplando" kaj subportantaj transversan horizontalan trabon "framĉapelo". Dispuŝaj pecoj "kverpecoj" konservas la distancon inter fostoĵoj kaj premas plankon sur la pario.

57) Supre tabuloj premas plafongrondon per pseŭda framĉapelo premstaranta sur framo per kojnformaj fiksiloj.

Ministo kavigas supre kaj enŝovas unu post alia tabulon, ĝis kiam ĉiuj supraj tabuloj estas enŝovitaj. Sirmita de tiu tabularo, li kavigadas sube; poste li starigas alian framon antaŭ la framo ebliginta la kavigadon. Laŭ uzita kavigmaniero oni kavigas la unuan galerion ĉe volbvertico aŭ ĉe kontraŭvolbo (b 42).

58) En disiĝema grundo, oni uzas metalan ŝirmilon, "fosŝildon, fosan ŝirmtubegon", kiu estas granda metalata envolvilto (b 43); ties antaŭaĵo havas bekon, kiu ŝirmas la kavigadon. Oni framsubtenas kaj volbizas malantaŭ la ŝirmilo. Tiu aparato fakte ne taŭgis en nehomogena grundo.

## XV. VOJKRUCIĜOJ

59) Iam antaŭe estis regule, ke nova vojo krucas vojon, straton, ŝoseon ĉiam samnivele. Pro graveco de trafiko, vojkrucoj eĉ vojforkoj, (= disvojiĝo), almenaŭ sur iom denstrafika ŝoseo, estas nun danĝera loko, kiun oni forigas aŭ ĉe kiu oni reguligas cirkuladon. Reguligi cirkuladon per policistoj estas rimedo iom kosta, kiu malhelpas kaj malfruigas la trafikon. Bremsas same cirkuladon rondira vojkrucoj. Ĉe ĝi, meze de kruciĝejo kuŝas samalte kiel trotuaro gvidrondo (= gvidinsulo) aŭ rifuĝejo, aŭ staras gardŝtono luma aŭ ne. Radikala rimedo estas jena: konstrui la interkruciĝantajn vojojn je malsamaj niveloj, tiel ke unu transpasu la alian per ponto dum apartaj flankvojoj interkomunikigas la krucantajn ŝoseojn.

60) Sur konstruota vojo, oni pripensas tion jam ĉe fiksado de vojlinio; tamen tio ofte starigas malfacilaĵojn. Sed kiam temas pri modifo de ekzistanta vojo, la malfacilaĵoj estas ankoraŭ pli gravaj. Ponto, per kiu supra vojo transpasas malsupran vojon, devas havi sufiĉan

longon sur malpleno; tio kaŭzas gravan terŝovelon. Efektive necesas rezervi: alton de 4,3 metroj liberan sur malsupra vojo; bonan videblecon per sufiĉe longaj rektoj proksime de ponto. Necesas etigi la porveturanto malagraban impreson de rapidega iro tra mallarĝa trapasejo; kaj precipe reinterkomunikigi la kruciĝantajn vojojn; forigi akvon. Se oni pripensas, ke deklivo ne devas superi 4 centimetrojn po metro (1/25), oni konstata, ke longo de deklivaj vojspartoj proksimumas 100 metrojn. Do koncerne la plej simplan transpasejon de vojo sur alia, ambaŭ nur 6 metrojn larĝaj, la unua altigita je 3 metroj, la alia malaltigita je 3 metroj, tervolumeno fosota estas minimume 400 kubmetroj. Al tio aldonenda estas samkvanta volumeno por kunigaj (= interkomunikaj) flankvojoj. La tipo de tiaj perpontoj kruciĝoj diferencas laŭ rilata graveco de vojoj kaj laŭ akcepto aŭ laŭ neakcepto de tranĉo (= cizalo) sur neĉefa vojo (b 27). Okaze de du samĉefaj ŝoseoj sen cizalo, oni havas la tipon "ringo", kiu necesigas kvin pontojn, aŭ la tipon "trifolio, duobla ok, duoka kruciĝo", kiu bezonas nur unu ponton sed ampleksan. Pri vojforko sen cizalo oni uzas la tipojn "triangulo aŭ trumpeto".

## XVI. VOJO KRUCANTA FERVOJON

61) Kiam vojo krucas fervojon, ĝi pasas aŭ relnivele "transtraka relnivela pasejo, traknivela pasejo"; aŭ nerelnivele per ponto. Sub fervojo estas suba ponto "substraka pasejo", super fervojo estas supera ponto, "supertraka pasejo". Pli kaj pli oni decidas ne allasi traknivelan pasejon, ĉar ĝi baras vojon, haltigas cirkuladon (= trafikfluo) kaj kaŭzas akcidentojn. Ĉe konstruota vojo oni projektas ponton. Sur estanta vojo por forigi traknivelan pasejon, laboroj estas samaj kiel ĉe perpona vojkruciĝo. Tamen videbleco ne gravas sur fervojo, dum nivelo de trako apenaŭ estas ŝanĝebla. Do se vojo subpasas fervojon, la kavvojo estas ofte profunda, sekve terŝovelaĵo estas granda, forigo de akvo ofte malfacila.

62) Estigante traknivelan pasejon, oni atentigas ke angulo "vojo kun trako" ne estu tro akuta, time ke brutoj — tiuj ankoraŭ iras sur ŝoseoj — erare ekpaŝas sur fervojon. Ĉe traknivela pasejo, do barieroj ruliĝantaj sur reloj,

"rulbarieroj", aŭ ĉirkaŭ vertikala akso turnigantaj, "turnbarieroj", baras vojon kaj apartigas fervojon. Pli kaj pli oni emas uzi levstangojn anstataŭ barieroj, ĉar unu homo povas samtempe forigi la du barilojn.

## XVII. KONSTRUADO DE ĈARŜOSEO

63) Nun la artvirkoj, la terŝovelo estas faritaj; oni havas iom ebenan irlarĝon, sur kiu estas konstruota la ĉarŝoseo. Ĝenerale ne estas eble uzi la naturan grundon kiel ŝoseon, eĉ kiel fundamenton de ĉarŝoseo. Sosefundamento konsistas:

a) el ŝtonaro lokita mane, konsistanta el krudŝtonoj malsuperantaj 30 centimetrojn kaj el ŝtonetoj ricevitaj el pismaŝino.

b) aŭ el tavolo de betono fabrikita per betonmiksatoro (= betona miksaparato).

c) aŭ el dika tavolo de sablo.

Tiuj lastaj du materialoj transveturigitaj per ĉarumo estas ŝutitaj sur grundon, disetenditaj per ŝoveliloj, ebenigitaj aŭ profilitaj per rastiloj. Malpeza rulcilindro premas kaj ebenigas (= profilas) la fundamenton. Sur ĝin per forkegoj, vojistoj aŭ helpantoj ŝutas ŝtonetojn (= ŝtonrompajojn). Post ebenigo per forkegoj, post formdonado laŭ kalibrilego (b 30) mezpeza rulcilindro premas ŝtonetaron. Ŝutadinte sablon aŭ sablan teron per ŝoveliloj aŭ per ŝutkamiono, oni akvumadas per akvuma veturilo (= akvuma ĉaro tirata de ĉevalo (b 30) aŭ per akvuma kamiono, dum rulcilindro malrapide kaj regule ruliganta premadas, ĝis kiam la supraĵo estas regula kaj prefere iom konvekasa.

64) Tiu tegaĵo "akvomakadamo" konvenas nur sur neĉefaj vojoj, kie ĝi daŭras de 2 ĝis 10 jaroj, sed ĝi estas rapide detruenda de la nunaj rapidaj veturiloj. Kiam la akvomakadamo estas difektita, oni refaras ĝin (= oni remakadamas) per nova rulcilindrado sur malnova (= trivita) ĉarŝoseo kiel fundamento. La farmaniero estas sama, sed la rulcilindro povas esti peza.

Pro nedaŭro de tia akvomakadamo, oni serĉis pli longan daŭron, pli daŭran virkon, anstataŭigante la sablon (kiu ŝtopos la juntojn de la ŝtonetaro) per betono aŭ per modlebla ligmateriale; aŭ simple oni ŝirmas akvomakadamon per sternaĵo el iu gluanto: gudro, bitumo. Ĉar

gluantoj estas ĉiuj nigraj, oni slange nomas ilin specvorte nigraĵoj.

65) Betona tegaĵo bezonas dikon de 0,15 ĝis 0,20 metro por ke ĝi ne fendigu aŭ disrompiĝu ĉe batoj de trafiko, ĉar nur dika betono restas nedifektita sub batoj. Betono preparita en betonmiksatoro estas verŝita sur fundamenton, ebenigita aŭ profilita per kalibrilego, batita per vibratoro. Por ke sinsekvaj maldilatoj pro sekiĝo kaj dilatoj pro varmo ne difektu la betonslabojn kaŭzante hardikajn fendetojn (el kiuj sekvus kompleta detruo), betonslabo estas dividita je elementoj, "slaboj" de  $5 \times 10$  metroj per lignaj aŭ feraj latoj. Kiam betono sekiĝis, oni forigas latojn kaj anstataŭigas ilin per bitumo.

66) Kiam oni uzas modleblan ligmaterialeon — gudron aŭ bitumon —, oni faras jene: ŝtonetaro ŝutita kaj regule ebenigita aŭ profilita estas iome rulpremita per rulcilindro, "rulcilindrita", tiel ke ĝi estu maldisigita kaj ke la juntoj etigu. Tiam oni verŝas ligmaterialeon, ĝenerale bitumon ĉu state de emulsio aŭ fluidigitan per hejtado. Post ŝuto de sablo aŭ gruzo oni rulcilindras, tiele enigante la sablon aŭ gruzon en la juntojn. Aliajn sternaĵojn de ligmaterialeo kaj gruzo oni refaras se necesas, por ke la juntoj inter la ŝtonetoj estu plenaj kaj por ke la supraĵo estu sufiĉe regula.

67) Pri nura supraĵa tegaĵo, sternaĵo, tapiŝo de ligmaterialeo, oni komence rulcilindras ŝtonetojn kaj terecan sablon por estigi akvomakadamon. Kiam tiu estas seka, oni zorge balaas per balaveturilo (ĉevala aŭ aŭtomobila) por ke la supraĵo estu pura, senpolva kaj ke supre la juntoj estu iom malplenaj. Sprucmaŝino pulvoro ŝprucigas varmegan gudron aŭ bitumon "gudrizas, bitumizas" je kvanto de 1 ĝis 1,8 kilogramo po kvadratmetro. Voj(zorg)-istoj ŝutas sablon aŭ gruzon (10 ĝis 15 litrojn po kvadratmetro), kiun rulcilindro premas. Estas konsilinde, ke oni faru la saman jaron duan verŝon de 1 kilogramo da nigraĵo po kvadratmetro sed nur post finsekiĝo de la unua sternaĵo. Almenaŭ oni devas refari la sternaĵon la venontan jaron kaj poste ĉiun trian aŭ kvaran jaron. Bitumo ebligas eĉ sternaĵon nur ĉiun dekan jaron.

## XVIII. PAVIMITAJ ŜOSEOJ

68) Kiam la trafiko estas sufiĉe grava kaj peza (tio



okazas precipe en urboj sed ankaŭ en industriaj regionoj), oni konstruis iam antaŭe ĉarŝoseojn el ŝtonpavimeroj. Pavimero estas preskaŭkubo de malmola tranĉita ŝtono el bazalto, lafo, granito, sed precipe el grejso.

Sur ebenigita grundo (pli bone sur profilita fundamento), oni ŝutas sablotavolon de 0,15 ĝis 0,20 metro, oni premas ĝin, kaj oni metas pavimerojn flankon ĉe flanko laŭ vicoj perpendiklaj al ŝosedirekto, "vicoj kverraj al la ŝoseakso", tiel ke la kverprofilo estu iom arka (konvekseco de 1/60). Pavimistoj ramante la pavimerojn per manramiloj (b 31) kaj konservante regulan profilon firmigas la pavimon: ili profilonas la pavimon. Poste por ŝtopi juntojn oni ŝutas sablon, kiun oni enigis en la juntojn per balailo kaj per denta ŝtopstango (b 30).

69) Nuntempe oni decidas ne konstrui tiajn pavimojn, ĉar ili estas penigaj por aŭtomobilkondukantoj (= aŭtanoj), por ciklantoj, por ĉevaloj; oni faras ŝtonpavimon el pavimeroj "mozaikan pavimon" (b 24): la vicoj de pavimeroj desegnas supraĵe cirklarkojn, "ordinaran, pavvostan mozaikon". Krom la arkeco de la vicoj, la konstruado estas sama kiel pri pavimeroj, sed cirkuli sur pavimeroj estas multe pli agrable por ĉiuj.

70) En grandaj urboj oni uzis lignopavimon (b 33). Sur fundamento el betono zorge kaj ĝuste kalibrata, oni sternas tavolon el riĉa (= grasa) cimentmortero. Lignopavimeroj prefere el mola ligno, praktike el abio aŭ pino, havas altan regulan (inter 3 kaj 15 centimetroj). Oni metas ilin laŭ vertikalaj lignofibroj. Por ke la pavimeroj estu malpli dilateblaj kaj ne putru, oni trempadas ilin en bolantan kreoazon. Plie timante dilaton, oni lasas laŭlonge de trotuarrandaĵo puŝjunton ŝtopotan de gudrata sablo aŭ de bituma kartono aŭ de ladŝtopilo. Inter la pavimeroj restas juntetoj, kiujn oni ŝtopas: malsupre per bitumo, supre verŝante fluidan cimentmorteron. Fine oni ŝutas sur la supraĵon gruzeton de malmola ŝtono por malhelpi gliton. Cirkulado estas nebrua sed ĉe malseka vetero, tiu tegajo estas glita precipe por veturiloj kun pneumatikoj. Tial oni provis sterni sur lignopavimon gudron aŭ bitumon; sed tiu sternaĵo ne daŭras pli ol du jarojn.

71) Kiam la ŝtono taŭga por pavimero ne ekzistas en iu regiono, oni uzas brikojn speciale bakitajn je preciza temperaturo, "pavimbrikon". Sur betonan fundamenton,

oni sternas tavolon de sablo; post premado de tiu tavolo, oni metas brikojn prefere sur etan flankon (= etflanken) kaj oni ŝtopas la juntojn per bitumo. Brikpavimo rompiĝas facile sub peza veturilo kun metalaj radringoj (v b 30).

Oni ankaŭ provis pavimi per kaheloj el betono, el asfalto, el gisfero, el kaŭĉuko kun pli malpli da sukceso.

## XIX. APARTIGO DE CIRKULANTAROJ

72) Pli kaj pli grava cirkulado instigis larĝigi la ĉarŝoseon. Teorie 5 metroj sufiĉas por pasi pretere aŭ renkonte. Pro veturiloj rapidaj aŭ larĝaj kiel ŝarĝveturiloj necesas 6 metroj. Sed cirkulado iĝas facila nur se ĉarŝoseo estas 7 metrojn larĝa. Faciligo de preterpaso necesigas 3 veturlarĝojn po 3 metroj; meza veturlarĝo utilas nur por preterpasi. Kiam oni konstruas ĉarŝoseon je 4 larĝoj, duonlarĝo de ŝoseo, do 2 veturlarĝoj, estas asignita por unu ununura (= unudirekta) senco. Oni lasas herbokovritan striegon meze de ŝoseo por eviti kolizion (v b 32).

73) Oni ankaŭ apartigas la diversajn cirkulantarojn, konstruante vojojn specialajn por unu speco de cirkulanto. Por la piedirantoj ili estas: ekster urbo, pado sur ŝosebordo; en urbo, trotuaro, najla pasejo montrita per egkapaj najletoj, eĉ subtera pasejo. Por ciklantoj oni konstruis ciklovojetojn. Ciklovojetojn situas laŭlonge kaj tute apud ordinara ĉarŝoseo, aŭ estas apartigita per striego, aŭ estas tute nedependa. Sur vojetoj ĉiu irsenco, se ĝi estas aparta, bezonas larĝon de 1,5 metroj. Se ambaŭ irsencoj ne estas apartaj, larĝo estu minimume 2 metroj. La ŝoseo de tiaj vojetoj, necese glata, konsistas ĝenerale el ŝtona firma ŝoseo sur eta fundamento kun supraĵa sternaĵo de gudro aŭ de bitumo. Ĉe vetura alirejo de apudaj domoj, la fundamento estas tiel fortika kiel sub ordinara ĉarŝoseo.

74) Oni ne konstruas vojojn rezervitajn por ĉevalveturiloj, sed oni malpermesas partojn de vojo al ĉevalveturiloj. Kontraŭe oni konstruas por aŭtomobiloj apartajn ŝoseojn "aŭtoŝoseojn". La du fluoj de cirkulado estas nepre apartaj; aliro kaj eliro je ŝosego estas eblaj nur en kelkaj lokoj. Tie estas vojoj tiaj, ke ĉiu cizalo de trafiko estu neebla (v § 59+) (b 27). Nenie estas samnivela

vojkruciĝo. La plano de vojlinio prezentas malmultajn ĝirejojn, ĉiujn grandradiusajn. La kverprofiloj, tute ebenaj sur rekta parto, havas sur ĝirejo deklivon zorge kalkulitan, rilatan al la plej akceptebla rapido de veturiloj. La laŭlonga profilo estas tia, ke estas iompostroma (= progresiva) ligokurbo inter suprena kaj malsuprena deklivo, kaj precipe ke la videbl(ec)o estas sufiĉa apud supro.

75) Tia aŭtoŝoseego ege multe kostas: en Francujo ĉirkaŭ 500.000 dolarojn po surkampara kilometro, duoblon en loĝatejo. Sekve konstruo de aŭtoŝoseego estas akceptebla nur kiam oni devas komunikigi inter si urbegojn, kies cirkulantaro estas grandega, aŭ ebligi rapidan eniron en urbon, kies ĉirkaŭurbo estas ampleksa, aŭ estigi preterirejon ĉirkaŭ urbejo.

## XX. ARBOLINIOJ SUR VOJO

76) Kiam ŝosebordo estas sufiĉe larĝa (minimume 4 metrojn), oni povas planti sur ĝi unu vicon da arboj: acero, ailanto, fago, frakseno, hipokaŝtano, platano, poplo, robinio, sorparbo, tillo, ulmo, pomarbo, pirarbo, ĉerizarbo ktp (v b 32). Tiuj arboj ŝirmas la ĉarŝoseon kontraŭ sekeco, la irantojn kontraŭ varmega suno. Ili montras vojon dum nokto dum nebulega aŭ neĝa vetero. Oni plantas la arbojn junaj, elfosinte truon. Oni gardas ilin kontraŭ brutoj per korseto el palisoj kaj pikildratoj. Oni eĉ akvumadas. Oni tondas la arbojn ĉe konvena tempo kaj laŭ speco de arbo; oni fortranĉas superfluaĵn branĉojn por formi la arbofilon.

## XXI. VOJSIGNALIGO (b 28 29)

77) Por informi la iranton pri ĉio utila dum iro: distanco, direkto, oni ekipas vojon per signaloj "oni signalizas vojon".

Jam antaŭe por ke iranto sciigu pri nomo kaj distanco de proksimaj urboj, same por kontroli laboron de vojistoj, por difini deponejojn de materialoj, oni starigis distanĉŝtonojn. Tiuj estas tranĉitaj markŝtonoj, etaj ĉe ĉiu hektometro, 0,6 metron altaj ĉe ĉiu kilometro aŭ mejlo. Oni aldonis montran foston aŭ montran ŝtonfoston ĉe vojforko aŭ ĉe vojkruciĝo. Sur plako el emajlita metalo aŭ el gisfero kun reliefaĵ literoj "vojŝildo" aŭ sur ŝton-

fosto estas skribitaj la nomo, direkto, distanco de pli malpli proksimaj urboj kaj la numero de la vojo.

78) Krom la distanĉŝtonoj, la nunaj vojaj signaloj estas:

a) oblonga panelo pri lokalizo (nomo de tiea loĝatejo, de tuj transpasota rivero, ktp.).

b) triangulo kun vertico supren pri danĝero, malhelpaĵo, obstaklo, laborejo, baro.

c) oblikva kruco pri tranknivela senbariera pasejo.

d) disko pri ordono, devigo, malpermeso (unudirekta irsenco, haltado), limigo (de alto, pezo, larĝo, rapido, preterpaso).

e) oblonga aŭ sagforma panelo kun nomo de proksimaj loĝatejoj pri distanco kaj direkto.

f) oblonga panelo de direkta antaŭsignalo, kiu lokita antaŭ vojforko aŭ kruciĝo, per skemo informas la veturanton pri la trafotaj vojoj.

g) triangulaj signaloj kun vertico malsupren sur neĉefa vojo por indiki, ke la ĉefa vojo estas antaŭpasorajta (= estas estra), ke la veturanto sur la ĉefa vojo rajtas kruce pasi antaŭ la veturanto de sur la neĉefa vojo. 150 metrojn antaŭ kruciĝo staras averta triangulo, kaj ĉe kruciĝo mem staras la loka signalo: trafikfosto kun triangulo je vertico malsupren: "antaŭpasa fosto, estreca fosto".

## XXII. VOJ-FLEGADO KAJ NEĜFORIGADO

79) La vojisto forigas koton per skrapileto aŭ per balailo, iufoje post akvumo per akvumĉaro (b 30). En ĉarŝoseo, oni ŝtopas la fariĝintajn truojn per ŝtonetoj aŭ per gruzo kun emulsio de bitumo. Plie la tegaĵo pro uzo maldikiĝas, difektiĝas, iufoje glitiĝas. Do iam kaj iam oni regudrizas, rebitumizas, refaras la sternaĵon per nigraĵo kun gruzo aŭ sablo. Pro la peza cirkulantaro (tiu de ŝarĝveturiloj) estiĝas ondaĵoj malhelpantaj rapidan veturon; aŭ ŝtonoj de makadamo intere sin pistas "sin trivas", tiel ke sub la tegaĵo restas nur tavolo de polvo miksitita kun gruzo. Tia tavolo ne sufiĉas por gluteni la surfacan tegaĵon. Oni devas refari la makadamon. Rulcilindro per pioĉaparato, pioĉpintoj, aŭ pioĉpintaro, aliffoje tiranta pioĉĉareton pioĉas la malnovan tegaĵon kaj malnovan makadamon; oni forigas la pioĉaĵon, alportas novajn

ŝtonojn, rerulcilindras makadamon, refaras la sternafon.

80) Vojistoj kun helpantoj iam kaj iam per pioĉo (b 31) redonas konvenan profilon al longfosaĵoj, al flusulkoj (b 3), rekonturas la randojn de ŝosebordoj, kies randojn malpurigas la tero iom post iom falinta sur la ĉarŝoseon. Oni flegas la artvirkojn jene: juntoj de masonaĵoj estas restopitaj per cimentmortero; la metalaj partoj estas farbitaj, por ke rusto ne estiĝu, kiu rodus la metalon.

81) Kiam neĝo abunde falas, oni forigas ĝin per neĝforigilo (b 30). La plej simpla neĝforigilo estas en formo de "V" (= V-forma neĝplugilo). Ties lateroj, kiuj formas la "V", estas vertikalaj tabuloj larĝaj je 0,3 ĝis 0,4 metro. Ĉevaloj, traktoro aŭ kamiono tiras ĝin. Pli efika estas, muntita sur aŭtoĉasio sokego konsistanta el fendilego (= steveno) kun tuj poste simpla aŭ duobla renversilego similanta en pli grandaj dimensioj renversilon de plugilo. Tiu aparato "stevena neĝforigilo" efikas ĝis alto de 1 metro da freŝa neĝo. Sed se denove neĝas, ĝi ne plu efikas, ĉar la du randaj muroj de premita neĝo antaŭe starigitaj malhelpas la pluan forigon. Pli efikas aparato sur aŭtoĉasio kun radoj, kiuj turniĝante forigas neĝon "rada neĝojeta kamiono".

82) Unua tipo de rada neĝjeta kamiono portas sokegon kun ambaŭflanke du padelradoj. Dua tipo havas antaŭe sokegon kaj malantaŭ la kamiono radon kun ŝoveliloj, kiuj jetas neĝon. Tria tipo "turbina neĝojeta kamiono" portas 1 au 2 turbinradojn, "frezradojn" kiuj disigas kaj forjetas neĝon eĉ iom densigitan. Ĉar neniu maŝino kapablas forigi neĝon premitan aŭ glaciĝintan, estas necese forigi neĝon rapide, do havi samtempe multajn neĝforigilojn. Plie la forigo mem multe kostas.

Sur ŝirmata vojparto, kie vento ne blovas aŭ ĉesas blovegi, la neĝo amasiĝas. Iufoje per neĝbarilo (= kontraŭneĝa barilo) oni sukcesas estiĝi la neĝamason ekster la vojo.

83) Ŝtonpavimitaj ŝoseoj. Kiam pavimero malleviĝis (= malniveleĝis, malaltiĝis), oni ĝin relevas (= renivelegas, realtigas). Por tio, iom malgarninte la ĉirkaŭpavimerajn juntojn per metala stangeto, pavimisto levas la pavimeron per levilstangetoj, kies ekstremajon li enigis en juntojn (b 46). Verŝante akvon tra juntojn, la pavimisto faligas sablon sub la pavimeron. Rekompletiginte la juntojn per

nova sablo, li profunden ŝovas la pavimeron per pavimista martelo kaj per manramilo (b 31). Tion li tute refaras, ĝis kiam la pavimero estas ĝustnivela. Kiam temas pri aro da pavimeroj malleviĝintaj, la pavimisto forprenas unu pavimeron per levilstangetoj, ceterajn pavimerojn per mano. Li forprenas la malpuran sablon, ŝutas novan sablon, premas tiun, kaj remetas en lokon la pavimerojn: malnovajn se ankoraŭ taŭgaj, novajn se bezonas.

84) Lignopavimitaj ŝoseoj. Trifoje en semajno oni lavas ĝin; trifoje en jaro oni ŝutas gruzon, kaj malgarninte la junton apud borderaĵo, oni ŝtopplenigas tiun junton per nova sablo. Se iu pavimero malleviĝis, oni rompas ĝin per pinta stango kaj anstataŭigas ĝin. Se estas kavaĵeto, oni rompas unu pavimeron, oni forprenas la aliajn pavimerojn, kaj refaras la pavimon per pavimeroj konvene altaj.

## XXIII. KONKLUDO

85) Kiel la leganto povas konstati, la ŝosetkniko estas tre varia. Kvankam devenanta nur de komuna saĝo, tiu tekniko postulas ĝisfundan konon pri materialoj, pri iloj, pri rimedoj. Neniu materialo estas ĉiamdaŭra, neniu konstruaĵo povas eviti la skrapadon de l' tempo; cetere daŭrema virko estas ĝenerale kosta, aŭ pro materialo en si mem kosta, aŭ pro transporto kiu kostas proporcie al pezo kaj distanco.

Plie akordigendaj estas la postuloj de la nuna cirkulanto, de ĉiuj irantoj rapidaj kaj malrapidaj, eĉ de neirantoj, ekz. de la vojbordanoj.

86) Elstaras ankaŭ elspezaj problemoj: pri ŝoseoj, kiel pri iu ajn konstruaĵo; la afero estas konstrui, konservi, flegi kiel eble malplej elspezante, ŝparante homan klopodon, homan laboron, monon. Sparcele oni uzas prefere tieajn materialojn, oni elektas la supoze taŭgajn solvojn, kalkulinte kaj komparinte konstruelspezojn kaj konservelspezojn. Cetere estiĝas administraj problemoj: apliko de leĝo ĝenas, tro rigora apliko estus iufoje maljusta. Oni estas trudpelita akordigi leĝon kun la individuaj rajtoj.

87) Tiu giganta laboro celas plibonigi materian kaj socian: faciligi transporton, ebligi rapidan aliron al ĉiu loko, ebligi interŝanĝojn profitajn al homa socio, ebligi ke ĉiu homo, ke ĉiu kom grupo ne restu aparta, povu helpi

alian kaj esti helpata. Precipe en malvarmaj regionoj: norda Skandinavio, francaj montaroj oni rimarkis, ke vilaĝoj aŭ domoj ŝen alirvojoj iom post iom senhomiĝas. Spic(vend)jisto, panisto ne venas; kuracisto, akuŝistino alvenas nur malfacile, piede, cikle aŭ ĉevale dum bela sezono kaj kiam neĝas tute ne alvenas. En francaj afrikaj kolonioj indiĝenoj iĝas pli laboremaj, kiam ŝoseo atingas ilian loĝatejon. Konstrui vojojn estas do socia servo.

88) Do, por estonte etigi klopodon nune penigan, la homoj de nun riskas egan laboron. Tie kaj ĉie taŭga aranĝo de vojoj sur la tuta terglobo estas malrapidega kapitaligo de homa penado. Tiu kapitalo bezonas flegadon; sekve la flegado kreskas proporcie al aranĝo.

## XXIV. PLANNOTADO

90) Por noti planon de regiono, oni elektas rektojn tiom longajn kiom ebligas teromalebenajoj kaj la vidkapablo (perokula aŭ perlorna) de la notanto.

Signinte tian rekton per celstangoj (b 56); oni mezuras la rekton per mezurĉeno (b 64) aŭ per mezur(ŝtal)bendo (b 63) de 1 aŭ 2 dekmetroj (= dekmetra bendo, dudekmetra bendo). Angulo inter rektoj estas mezurata per angula mezuraparato: hara aŭ fadena "gonmetro"; lorna "angulkopo"; aŭ per kompasoj kun aŭ sen celilo (b 54); ankoraŭ pli simple, anguloj estas kalkulataj post mezuro de angulŝnuro (b 5) per mezurbendo.

Rilate bazan rekton (b 5), oni notas kaj difinas sur plano la pozicion de notota punkto per ĝiaj koordinatoj. Per orteskopo (b 61 62) hara, fadena aŭ spegula, oni determinas sur la plej proksima baza rekto la faldpunkton, "piedon" de la perpendiklo pasanta tra la notota punkto. Poste oni mezuras la longon "abscison" inter deirpunkto de la baza rekto (ĝenerale ties eka vertico) ĝis la trovita piedo de perpendiklo kaj la longon de la perpendiklo mem, "ordinaton". Se oni uzas plannotan tableton (b 25), oni notas la punkton senpere, desegnante la planon sur papero.

Dezirante plian precizecon pri plano, oni uzas trianguladon, t.e. oni kovras la regioneron per grandegaj trianguloj, sin apogantaj sinsekve unu sur la alia per komuna latero, kaj tiel ke triangulo sin apogu sur la tuj antaŭe situata.

91) Determininte la ebenajn poziciojn de utilaj punktoj,

oni nivelnotas tiujn punktojn, t.e. oni kalkulas ties altecon (= nivelon) per nivelnota aparato "nivelskopo akva, hara, fadena, lorna, pendola (= lensa)" (b 51+) kun celplaka stango (b 56) aŭ kun nivela celtabulo (b 57+). Tia nivelo situas super la marnivelo "supermara nivelo aŭ alteco", kiam oni deiras de nivela fiksmarko (= nivela fikspunkto) ĝenerale materialigita per nivelbiteto (b 67); sed ĉar nur relativa nivelo utilas, eblas asigni al iu punkto laŭvolan nivelon por poste kalkuli aliajn nivelojn rilatajn al la unue nivela fiksitaj punkton.

Por determini sur tero samdeklivan linion, oni uzas deklivan mezuraparaton, "deklivskopo hara, fadena aŭ lorna".

92) Iufoje oni uzas pli perfektigitajn aparatojn. La teodolito (b 50) sciigas la valoron de anguloj vertikalaj kaj horizontalaj, do sciigas pri angula situacio alteca kaj ebena. La takometro plie sciigas pri distanco.

93) Priskribo de aparatoj.

La celstango (= paliseto) (b 56) estas dumetra vergo farbita alterne ruĝa kaj blanka, kies piedo estas provizita per ferpinto por enfikso en grundon.

Por mezuri longon per mezurĉeno (b 64) aŭ per mezurbendo (b 63), oni enigas en grundon pintajn pecojn el ŝtaldrato "pinglegoj" (b 65).

Orteskopo utilas por indiki direkton de perpendiklo. Hara (aŭ fadena) orteskopo (b 61) bezonas unupiedan portilon "unupiedan stativon". Spegulan orteskopon (b 62) oni mantenas dum pezŝnuro (b 66) precize indikas la terpunkton, sur kiu la orteskopo staras.

Kompason (b 54) oni uzas sur mano sen stativo aŭ sur stativo unupieda aŭ tripieda.

Plannota tableto (b 55) estas rektangula ligna plato fiksebla sur stativo per globartiko.

94) Ĉiu angula mezuraparato sidas sur stativo (b 55 59), kiu portas aŭ globartikon (v b 52) aŭ bazpladon (v b 55) havantan tri foldetojn forajn je 180 gradoj (= je triono de cirklo) unu de la alia.

Hara (aŭ fadena) limba gonmetro (b 53) konsistas el granda duoncirkla limbo ofte kun kompasoj. Sur ambau ekstremajoj de la randa diametro de duoncirklo, vertikale staras ero de lato, en kiu estas luketo, "celfendo", provizita de vertikala haro (aŭ fadeno), "fiksa celumilo".

Movebla lateto, "movebla celumilo aŭ alidado", kies mezo rotacias sur centro de limbo, havas sur ĉiu el siaj ekstremajoj limberon, "vernieron", kun du celfendoj samaj kiel tiuj de fiksa limbo. En fadena (aŭ hara) cilindra gonmetro (b 60), la celfendoj troviĝas en la pario de cilindroj: du celfendoj en la suba cilindro fiksebla sur stativo, du celfendoj sur la alia cilindro movebla.

En la lorna gonmetro "angulskopo" (kp b 50), lorno anstataŭas la harhavajn celfendojn. En la lorno mem, krucfadenaro ebligas precizan celumon. Lorntubo rotacias en vertikala ebena ĉirkaŭ du samaksaj pivotoj, per kiuj ĝi kuŝas sur du pivotingoj fiksitaj sur la bazo.

#### 95) Nivela celtabulo.

La stango kun celplako "celplaka stango" (b 57) estas dumetra kvadrata stango "kvadratesekca stango" plilongigebla ĝis 4 metroj, gravurita per centimetra skalo. Sur tiu stango glitas plako damtabule farbita "celplako". La leg(ebl)a nivela celtabulo, "nivellega celtabulo", (b 58) uzebla nur kun lorno, estas tabulo, post disfaldo 4 metrojn longa, 8 ĝis 10 centimetrojn larĝa, dukolore farbita laŭ unucentimetra aŭ ducentimetra skalo kun ciferoj indikantaj la decimetrojn. La notanto per ciferoj kaj skalo legas mezuron en la lorno mem, kaj tiel ne timas legerarojn de la helpanto, kiu tenas la tabulon.

96) Teodolito (b 50) konsistas el bazo kaj el lorna parto. Bazo konsistas el vertikala pivotingo fiksitaj sur triangulo. Tiun triangulon subportas tri fiksisraŭboj (= ĝustigisraŭboj), kiujn oni lokas sur la foldetojn de la bazplado (kp b 55). Ĉirkaŭ pivotingo troviĝas turnebla cilindro, cetero fiksebla per premisraŭbo. Tiu cilindro portas fiksitajn sur si inan cirkon (= cirkla krono) "domkrono", kies interna rando estas gravure gradigita "limbo". Lorna parto staras sur pivoto fiksitaj al rotaciebla vira plado "movebla plado, alidada plado". Rando de movplado havas gradigitan parton, "vernieron". Movplado portas la lagrajn fostetojn de la lorno kaj flanke vertikalan cirkulan kronon, "vertikalan domkronon" kun limbo. La lorno kaj la sur ĝi fiksitaj vira cirklo povas turniĝi ĉirkaŭ akso kuŝanta sur la fostetoj. Premisraŭboj senmovigas, kiam necesas la diversajn pladojn. Apud ĉiu premisraŭbo, rektifa sraŭbo ebligas finan alĝustigon.

#### 97) Nivelskopoj. Akva nivelskopoj.

Sur stativo kun globartiko (b 52), metala tubo unu metron longa portas sur ĉiu ekstremaĵo boteleton el travidebla vitro. Iĝinte horizontala la tubon kaj vertikalaj la boteletojn, oni duonplenigas tiujn lastajn per akvo prefere kolorita. Celumo sur la supraĵo de la akvo de la boteletoj montras horizontalon.

#### Lorna nivelskopoj.

Ĝi staras sur stativo (b 51) per sama pecaro kiel angulskopoj: fiksisraŭba triangulo (= ĝustigisraŭba triangulo), pivoto. Bazo de nivelskopoj, fiksitaj sur pivoto, portas du ansojn, en kiuj kuŝas la lorno ĉirkaŭ si mem turnebla. Unu (aer)vezika nivelilo (= nivelileto) staras sur lorno aŭ sur ansoj.

#### 98) Pendola (lensa) nivelskopoj.

Senpere sur stativo staras malplena cilindro (b 59). Muntita sur tiu cilindro pere de kardana pendigilo kaj orta je pendolo estas celuma tubeto kun horizontala fadeno kaj ununura lenso. La bildo de fadeno projekciigas sur sama ebena kiel la bildo de celplako aŭ de celtabulo. Pendolo liberigita sekvigas (ĉe konstrue ĝustigita aparato) horizontalecon de celumo.

#### Lorna deklivoskopoj.

Ĝi estas lorna nivelskopoj kun vertikala limbo, tiel ke ĝi montras ne nur horizontalecon (nivelon) sed ankaŭ deklivon.

## MALLONGIGOJ

Pri nacilingvaj tradukoj : A Angla; U Usona; F Franca; G Germana. U estas uzita nur kiam ekzistas apartaj dirmanieroj; pri mallongigoj A kaj U estas sama lingvo.

|          |  |      |                            |
|----------|--|------|----------------------------|
| a        | artvirko   | pr   | pramo, flosponto           |
| b        | bildo, figuro  | s    | signalo                    |
| c        | cintro   | ŝ    | ŝoseo                      |
| f        | foso, ŝovelo   | t    | topografio, plano, irlinio |
| fu       | fundamento   | t ap | topografia aparato         |
| k        | konservo   | tr   | trafiko                    |
| kp       | komparu  | tu   | tunelo                     |
| n        | neĝo   | v    | vidu ankaŭ en              |
| nt       | netransitiva   | v-   | vidu ĉe antaŭa vorto       |
| p        | ponto  | v+   | vidu ĉe sekvanta vorto     |
|          |  | z    | vidu laŭ alfabeto vico     |
| ferPonto | vidu tradukaĵon ĉe la artikolo : ponto   |      |                            |
| metala'  | vorto de ĝenerala lingvo ne tradukita  |      |                            |
| ( )      | parto forigebla : Steg(blech) legu : Steg aŭ Stegblech sight (vane) legu : sight aŭ sight vane                       |      |                            |
| ( )      | difino, klarigo  |      |                            |
| (=)      | vorto akceptebla anstataŭ la tuj antaŭa  |      |                            |
| (=)      | vorto akceptebla anstataŭ la sekvanta  |      |                            |
| " "      | vorto anstataŭebla de vorto en (= ) aŭ en (=), kiam estas dubo; burnt (=baked) clay legu : burnt clay aŭ baked clay; |      |                            |
| =        | Esperanta vorto kompleta, titolo de artikolo   |      |                            |
| ~        | parto grandlitere presita de la titolo de artikolo   |      |                            |
| -        | tuj antaŭa Esperanta vorto kompleta  |      |                            |
| '        | tuj antaŭa Esperanta vorto sen gramatika finaĵo  |      |                            |
| /        | apartigas en unu vorto : Sand/bett, pri s en sekvanta tradukaĵo de la sama lingvo, legu Sand                         |      |                            |
| S        | nacilingva vorto ekanta per unu majuskla s en la sama artikolo de la sama lingvo                                     |      |                            |

|       |                       |     |                                     |
|-------|-----------------------|-----|-------------------------------------|
| 30    | § 30 de la terminaro  | b 8 | bildo 8, figuro 8                   |
| 30+   | § 30 kaj 31           | 78a | alineo a de § 78                    |
| 30-33 | § 30 ĝis 33 inkluzive | ?   | nacilingva traduko ne estis trovita |

La vico de la vortoj post ĉiu radikvorto Esperanta estas la plej konvena por simpligi la plejmulton de la naciaj tradukoj konforme al la mallongigoj.

## A

**ABAKAĴo** (elstaranta impoŝta ŝtonegario) p 33: A F cordon; G Band  
**ABlo 70** : A common spruce, norway fir; F sapin; G Fichte  
**ABSCISO** t 90 : A abscissa; F abscisse; G Abszisse  
**ABUTMENTo** (pontparto) 29+ 32+ 36 40 45 51 : A abutment; F culée; G Widerlager  
**~piedo** p 36 v vangMURo; **~a subTRabo** (ligna) p 46  
**ACERo 76** : A maple; F érable; G Ahorn  
**ADMINISTRa** : = PROblemo 86; **~e'** pri speco de vojo 5  
**AERo** :  
**~umado** (de tu) 55 : A ventilation, aeration; F aération; G Ventilation, Lüftung  
**~vezika Nivelilo** t ap 97; **premit~a LOKomotivo** f 20  
**AGi** sur surfaco (premo) fu 22 : A to "act upon" (= effect on) a Surface; U to affect a S; F agir sur une surface; G auf eine Fläche wirken  
**~ado subĉiela** t 14 : A operations in the open air, field work; F opérations en plein air; G (Vor)Arbeiten unter freiem Himmel  
**AGRABLa** Cirkulado tr 69; **mal=** impres' tr 80  
**AILANTo 76** : A Japan varnish; F ailante, vernis du Japon; G Firnisbaum  
**AKCEPTo** de cizalo sur vojo tr 60 : A Admission of crossing; U A of cutting; F acception de cisaillement sur une voie; G Zulassung von Kreuzung  
**~ata** : DEklivo t 14, LImo t 16, PEzo de ŝarĝo t 16, REzisto t 16  
**~ebila** : DEklivo de taluto a 25, RAPido tr 74

**AKSo** (de rotacio) p 28 tr 62 t ap 96 : A Axis; F Axe; G Dreh/Achse, KippA  
 = **horizontala** (de levp) 28 : A horizontal A; F A horizontal; G waagerechte A  
 = **kuŝanta** sur fostetoj t ap 96 : A trunnion A; F A des tourillons  
 = **vertikala'** p 28 tr 62  
 ~**Linio** de vojo t 14+; **laŭ~e** SEKci p 11; **sam~a** Pivoto t ap 94  
**AKUtA** ANgulo tr 62  
**AKVo** 34 60+ 68 83 : A Water; F Eau; G Wasser  
 = **kvieta** fu 31 : A still W, smooth W; F E tranquille; G stilles W  
 = **ne profunda** fu 31 : A shallow W, not deep W; F E peu profonde; G untiefes W  
 = **subtera** a 25 : A subsoil W, ground/W; U underground W; F E souterraine; G Grund/W  
**pluv**= § 8 11 a 26 : A rain W; F E de pluie; G Regen/W  
 = **baranta** ZOno fu 31; =**barilo** keŝta fu 31 v keŝta DIgo; =DUkto 10; =**EFiko** disigema p 30; =**KOndukajeto** subtera § 9; =**MAkadamo** § 64 67  
**haltigi enFLuon de** = p 31  
**AKVa** : niveln ta aparato t ap 91 v+, nivelSKopo t ap 91 97; **en**= FCuto p 45 ~**eca** GRundo fu 31  
**AKVEDUKTo** a 27 : A Culvert F Aqueduc; G Durchlass  
 = **skatola** 27; A box-drain, box-C; F A dallé, dalot; G Platten/D  
**gis**= **supraja** 9 v enŝosea TUbo; **slab**= 27 v skatola =  
**tub**= 27 : A pipe C; F A-buse; G Rohr/D, Röhren/D  
**AKVUMi** arbon 76 : A to Water a tree, to hose; F Arroser un arbre; G einen Baum begiessen  
 ~**adi ŝoseon** § 63 : A to W a carriage way; F A une chaussée; G eine Strasse besprengen  
 ~**o de ŝoseo** k 79 : A WAttering; F Arrosage de chaussée; G Besprengung einer Strasse  
 ~**a ĉaro** (= ~a veturilo) § 63 79 : A WA cart, WA tank; F tonneau d'AR; G Sprengwagen  
 ~**kamiono** § 63 : A WA motor car; F arroseuse automobile; G Motor/S  
 ~**veturilo** § 63 v ĈAro  
**AL** BOrdigo de pr 54; 'ejo 54; ~**Doni** § 60 tr 77; ~**FLui** (akvo) § 26; ~**Ĝustigo** fina t ap 96; ~**Iro** § 74 87; ~**IREjo**

§ 73; ~**IRvojo** 87; ~**LAsi** tr 3 § 61; ~**MEti** p 47 51; ~**MOnte** (de plandumo) p 30; ~**POrti** f 8 17 § 79; ter~  
 POrtO f 17; ~**VAle** (de plandumo) p 30  
**ALo** : ~**eto** t ap 94 : A vane; F pinnule; G Schlitz  
 = MUro p 36  
**ALeo** (avenuo) § 4 : A alley; F allée; G Allee  
**ALI** : =**LOkiĝi** p 28 pr 54; =**seksa FLanĝo** (de ramtabulo) fu 31  
**ALIDADO** t ap 94 : A F alidade; G Dioptrineal  
 ~**PLado** t ap 96  
**ALMo** (de trabo) p 41 : A Web (plate); F Ame; G Steg (Blech), Steh/B  
 ~**ero** (de kradtrabo) 41 : A W of boom; F Ā de membrure; G S/B von Gurtung;  
**plen~a** TRabo 41  
**ALTa** (granda laŭ alto) kp nivela : A high; F haut, grand en hauteur; G hoch  
 = FRonto de fosaĵo f 19; konvene = **PAvimero** 84; = **tavolo'** f 18; **sam**= § 59  
 ~**nivela** : ŝtonego' p 33, trako' p 28; ~**Nivele** § 42; **laŭ~e** libera PASEjo p 28  
**ALTo** (longo laŭ alto) de balustrado 43, de muro 25, de neĝo 81, de taluso 20, de trabo 41 : A Height; F Hauteur (dimension selon la verticale); G Höhe  
 = **libera** (sub p) 60 : A Headway, H clearance, clear Hroom; F H libre; G DurchfahrtH, LichtH  
**LImigo pri** = **libera** s 78d  
 = **regula** de pavimero 70 : A regular H of sett; U regular H of units; F H régulière de pavé; G regelmässige H eines Pflastersteines  
**ALTECo** (absoluta nivelo) t 35 60 91 : A elevation, Difference in Levels; F élévation; G Höhen/lage  
 = **supermara** t 91 : A altitude (= Height) above sea level; F altitude; G Höhe über Meeresspiegel  
 = **vertikala** p 35 : A vertical H, D in L; F distance verticale; G H/unterschied, Höhe  
 ~**a Situacio** t 92; ~**Linio** t 14  
**duon~e** p 43 : A midway (= half-way) the height; F à mi-hauteur; G mitten an Höhe, auf halber H  
**ALTECIGi** (vojo) 11 : A to rise, to ascend; F monter; G steigen  
 re**ALTECIGi** pavimero 83 v re**LEvi**; **mal~ita** VOjo -60

**ALTERNe** farbita vergo' t ap 93  
**AMASo** : de ŝtonegoj' p 30, de tero' ŝ 17 p 36; ~**iĝi'** (neĝo) 82  
**neĝ-** tr 82 : A pile (= heap) of snow; U snow bank; F amas de neige, congère; G Schneewehe  
**AMPLEKSa** : ĉirkaŭURBo 75, keŝta digo' fu 31, konstruo' 2, ponto' 60, ŝtono a v ŜTonego 23  
**ANGULO** (mezura) t 14 90 92 p 28 ŝ 62 : A Angle; F Angle; G Winkel  
 = **akuta** ŝ 62 : A acute A; F A aigu; G spitzer W  
 = (angula parto) **de abutmento** p 33 : A CORner; F A; G Ecke  
 = **de trotuarrandajo** 8 : A arrise of kerb, CO of curbstone; F arête de bordure de trottoir; G Bordsteinkante  
 = **n de trabo rigidigi** p 41 : A to stiffen the angle of the girder; F raidir l'angle d'une poutre; G die Ecke eines Trägers versteifen  
 ~**LAdo** ebena p 41; ~**RElo** ŝ 8 p 41 46; ~**SKopo** t ap 90 94 97; ~**SNuro** t 90  
**ANGULa** : mezuraparato t ap 90 94 v gonMETro (angulSKopo), Pilaŝtro p 33, profilŝtango 8 v RElo, SITUacio t 92, ŜTonego p 33, ŝtonŝtako p 33 v Pilaŝtro  
**ANKRo** (de pramo) 53 : A anchor; F ancre; G Anker  
 ~**aja STango** p 51  
**ANSo** de nivelskopo t ap 97 : A collar, wye; F étrier; G Lagerring  
 = (en pendp) 51 : A loop, stirrup, carrying yoke; F étrier; G Bügel  
 ~**LIgilo** p 46; (**korb**)~**a VOlbo** p 35  
**ANTAŬ** : =ajo de piliero p 34 v beko; - de foŝildo f 58 v beko; =pasa FOŝto s 78; =pasorajta VOjo tr 78; =ESploro (de raŭto) 12; =GARDi kontraŭ falo p 43; =SIGNalo s 78  
**APARATo** tr 81 : A Instrument, Apparatus; F Appareil; G Gerät;  
 = t ap 92+ : A measuring I; F A de mesure; G Mess/Werkzeug  
 = **konstrue ĝustigita** t ap 98 : A in workmanship correctly adjusted I; F A réglé par construction  
 F A réglé par construction  
 = **perfektigita t ap 92** : A perfected A, elaborated I; F A perfectionné; G verbessertes W

= **dilata** p 42 : A expansion device; F A de dilatation; G Ausdehnungsvorrichtung  
**BOR-** mana f 19; **miks-** betona 63 65 v MIksatoro; **PIoĉ-** 79; **mezur-** angula 90 94 v angulSKopo (gonMETro), dekliva 91 v deklivSKopo; **nivelnota** = 91 v nivelskopo  
**APARTa** : flankVOjo ŝ 59, FLuo tr 73+, irSEnco tr 73+, Soseo ŝ 74  
**APARTIGi fervojon** ŝ 62 : A to isolate the railway; F isoler la voie ferrée; G die Bahn trennen  
 = **ĉirkulantarojn** tr 73 : A to segregate (= separate) the various forms of TRAffic; F séparer les circulations; G den verschiedenen Verkehr trennen  
 ~**o de ĉirkulantaro** tr 72 : A segregation of TR, channelizing for TR; F séparation de circulation; G Trennung, Absonderung  
 ~**ita** : Loko tr 27, SOseo ŝ 73  
**APERTURa** KEŝto fu 31  
**APERTURo** vertikala de p 15 : A headroom, headway, F ouverture verticale; G Durchfahrhöhe, Lichthöhe  
**kloak-** ŝ 26 : A manhole; F regard de visite; G Mannloch, Einsteigöffnung, Lichtschacht  
**APIKa** PARio f 21  
**APOGi (flanke)** f 31 : A to stay; F étayer; G ab/Steifen, ver/S, abspreizen  
 = **sin sur ŝnurego** pr 54 : A to rest (= to take support) on a rope; F prendre appui sur un cable  
 ~**iĝi** F firma grundo f 29 : A to stand on good bearing soil; F s'Appuyer sur le solide, s'A sur le sol résistant; G auf festem Grund stehen  
 ~**peco** f 19 : A stay; F étai; G Stempel, Stufe  
 ~**MURo** a 21 25; ~**PLando** p 42; ~**STango** f 31; ~**TRabo** f 31; ~**TRabeto** oblikva p 46  
**APOGILO** f 31 : A stay, support, prop; F étai; G Stempel, Stufe  
**mur-** a 21 v pilastro  
**APUD** : tut~**a palisTABulego** fu 31 kp ĉe  
**ARo da pavimeroj** 83 : A Group of setts, G of paving stones; U G of blocks; F groupe de pavés; G Gruppe von Pflastersteinen  
**voj-** 6 : A road system; F réseau routier (longueur); G Wegnetz  
**ARANĜi artikon** p 52 : A to provide with hinge; F



Ménager une articulation; G mit einem Scharnier versehen  
 = (flu)truon a 56 : A to install a weep hole; F M une barbacane; G einen Querschlitze lassen  
 ~o pendeca p 38; A support (= suspension) device; F dispositif de Suspension, S; G Trag/Vorrichtung, Hänge/V  
 ~ita BOrdo de § 8; ~ita alBordiĝejo (por pramo) 54  
**ARBo** 4 76 : A Tree; F Arbre; G Baum  
 = juna 76 : A young T, sapling; F jeune A; G junger B  
 = Llnio § 76  
 ~profilo 76 : A Shape of a T; U treelike S, arborescent S; F profil d'A; G B/profil, B/aussehen  
 ~profilon formi 76 : A to shape a T; F former le couvert; einen B verschneiden, die B/krone machen  
 êriz= 76 : A cherry T; F cerisier; G Kirsch/B  
 pir= 76 : A pear T; F poirier; G Birn/B  
 pom= 76 : A apple T; F pommier; G Apfel/B  
 sorp= 76 : A sorb, service T; rogn; F sorbier; G Eberesche  
**AREo liverita de p** 27 : A waterway of bridge; F débouché superficiel; G Flut/Weite, Durchfluss/W  
 = premita tr 22; A pressure area; F surface pressée; G gedrückte Fläche  
 voj= (= vojsidejo) § 7 21 25 : A road limits, highway; U road bed; F assiette; G Baubreite  
**ARGANa** POno 38  
**ARGILo** 24 31 : A Clay; F Argile; G Ton, Lehm  
 = bakita a 24; A burnt C, baked C, fired C; F A cuite; G gebrannter T  
 = premmuldata a 24; A moulded C, stamped C; F A moulée; G geformter T  
 = n knedi a 24 : A to mix C, to knead C, to work C, to roll C; F pétrir (= malaxer) de l'A; G T kneten; T mischen  
 = n pisti a 24 : A to crush C, to grind C; F broyer de l'A; G T zermahlen  
**ARKo** p 39 : A Arch; F Arc; G (Brücken) Bogen;  
 ~a : betonPOno 49+, ĈArpentajo 39, metalPOno 38+; parto' p 34, PLafono tu 55, POno 28 38+, PProfilo t 11 § 68, SPanaĵo p 29, TRabo p 50, TRuso p 39  
 ~forma PArto (de arkajo) 34; ~SAgo § 11 p 35+; ~SNuro § 11

cirkl= p 35; A circular A; F A de cercle; G Kreis/B  
 ~de pavimo § 69 : A A of sett paving; U A of sett paving; F A de cercle d'un pavage; G Pflasterkreis/B  
 cirkl~a VOLbo p 35; konveks~a PProfilo § 11; paf~a POno 28 pint~a VOLbo p 35  
 ~eco de vicoj (de pavimo) § 69 : A segmental form of paving; F convexité des rangées d'un pavage; G gewölbte Form  
**ARKAĵo** p 30 34 36+ (pri variaĵ specoj v volbo) : A arch; F Arche; G (Brücken)Bogen  
 = ligna p 27 : A wood centering : F A en bois; G hölzerner Gerüst/B  
**ARKADo** a 21 : AF arcade; G Arkade  
**ARMITAA** : BEtono a 24 p 28, CEmento p 24, ligna TRabo p 47  
**ARMATURO** ŝtala a 24 p 48 : A steel reinforcement; F armature d'acier; G Stahlbewehrung, Stahleinlage  
**ARTo** : ~efarita ŜTono a 24; ~laboritaĵo v+; ~VIRko 16+ 21 23 25 27 63 80  
**ARTIKo** flosp 25 : A Hinge; U Joint; F Articulation; G Scharnier  
 = metalp 39; A H, J; F A; G Gelenk  
 glob= t ap 93+ 97 : A ball joint, ball and socket J; U ball swivel; F A sphérique, genou à coquilles; G Kugel/G unu~a, tri~a TRabo p 50  
**ASFALTo** § 8 71 p 34 : A asphalt; F asphalte; G Asphalt  
 ~a : KAhelo § 71, TEGaĵo § 8, PLanko p 37, volbKOVriolo p 34  
**ASIGNi veturlarĝon** tr 72 : A to Assign a track, to A a traffic lane; F assigner une largeur de voie; G eine Fahrspur Anweisen;  
 = nivelon t 91; A to A arbitrarily a reduced level; F attribuer une cote; G die Höhenkote beliebig A  
**ATINGi KOMPenson** de terŝovelajoj f 15  
 = firman grundon fu 32 : A to Reach firm ground; U to dig to the stable ground; F atteindre le sol solide; G den tragfähigen Baugrund antreffen  
 ~o kosta fu 32 : A costly R; U expensive excavation; F Atteinte coûteuse; G teures Ausschachten  
 ~o neebla fu 32 : A impossible R; F A impossible; G unmögliches Erreichen  
**AŬTo** (= aŭtomobilo)

~**anto** tr 69 v **KONdukanto** ; -**SO**seo 5 ; -**SO**sego 5 13 74+ ;  
 =**VO**jo 3 ; =**ĉasio** tr 81  
**ŝarĝ**= (= kamiono) 20 : A (se kovrita) motor van, (se nekovrita) motor lorry ; U (kovrita) van, (nekovrita) truck ; F camion (automobile) ; G **LA**stkraft/wagen, **L**fahrczeug  
**AŬ**tomobilo tr 74 : A motor car ; G Auto(mobil), **K**raft-wagen  
 ~**a** : **BAL**aveturilo § 67 ; **T**Rafiko 5  
**AV**enuo 4 : A **F** avenue ; G **A**llee  
**AV**er**T**A **T**Riangulo s 78

## B

**BAK**ita Argilo a 24  
**BAL**ai § 67 : A to sweep ; F balayer ; G fegen  
 ~**ilo** § 68 79 : A broom ; F balai ; G Besen  
 ~**veturilo** § 67 : A Sweeping machine, mechanical sweeper ; F Balayeuse ; G Kehrmaschine  
 = **aŭtomobila** 67 : A **S** motor car ; F **B** automobile ; G Motorfegemaschine, Motor:K  
 = **ĉevala** 67 : A horse-drawn sweeper ; F **B** hippomobile ;  
**BAL**asto sabla § 22 : A Sand cushion, **S** Filling, **S** bedding, **S** ballast ; F ballast sableux ; G Sand/bett, **S**/schicht, **S**/unterbettung  
**BAL**ustrado p 43 45 47 : A side-rail, railing, guard rail ; F garde-corps ; G Geländer  
**BAR**i vojono tr 61+ : A to obstruct the way ; F barrer une route ; G den Weg sperren  
 = **penctron** de akvo p 34 : A to "hinder" (= prevent) the entrance of water ; F intercepter la pénétration de l'eau ; G den Eintritt des Wassers verhüten  
 ~**o** t 12+ 27+ s 78 : A bar, block, obstacle ; F obstacle, difficulté ; G Hemmnis, Hindernis  
 neĝ~**ilo** tr 82 : A snow fence ; F pare-neige ; G Schneegitter  
 akvo~**anta** zono fu 31 ; akvo~**ilo** kesta fu 31 v kesta Digo  
**BARE**lo p 52 : A barrel ; F baril, tonneau ; G Fass  
 ~**P**onto 52  
**BAR**iero ruliganta (= rul=) § 62 : A rolling Gate, rolling Barrier ; F Barrière roulante ; G Roll/Barriere

= **turniganta** (= turn=) § 62 : A **S**wing **G**, **S** **B** ; U pivot **G** ; F **B** pivotante ; G Dreh:**B**  
 sen~**a** relnivela **P**Asejo s 78  
**BASKUL-P**onto 28  
**BAST-T**abulo fu 19  
**BAT**i (betonon) 24 48 65 : A to "tamp" (= ram, beat) ; F damer, pilonner ; G stampfen  
 ~**o** p 65 : A shock, impact, blow ; F coup, choc ; G Stoss  
 man~**ilo** (por betono) p 48 : A muller and plate, hand-tamp ; F pilon à main, batte ; G Schlagbrett, Tasche  
 ~**maŝino** (por betono) 48 : A ramming (= tamping) machine ; F machine à pilonner, pilonneuse ; G Stampfer, Stampmaschine  
 ~**ita** : **G**Rundo § 8, **T**ERO § 2 8, **tera**jo § 37, **VO**jo 1  
**BAZ**o (de abutmento) 30 : A bottom, Base ; F Base ; G Unterteil, Sockel  
 = (de **t ap**) 94 96+ : A stage ; U **B** ; F **B** ; G Untersatz  
 ~**a** : **D**Ovelo p 34, **REK**to t 90 ; ~**G**Rundo de vojo 22 ; ~**PL**ado t ap 96  
**BAZ**al**T**o § 68 : A basalt ; F basalte ; G Basalt  
**BEK**o (de fosŝildo) f 58 : A fore-peak, fore-head ; F Avant-bec ; G Schnabel, Brustschild  
 = (de **piliero**) p 34 : A pier head, pier nose ; F **A** ; G Pfeiler-vorkopf  
**BEN**do **dekmetra** t ap 90 : A Steel Band of 10 meter, **S** tape ; U Measuring Tape ; F Décamètre à ruban d'acier ; G (Dekameter)-Bandmass  
 = **dudekmetra** t ap 90 : A Steel **B** of 20 meter ; F double **D** **mezur(Stal)bendo** t ap 14 90 93 : A (**S**) **T** ; **S** **B** ; U **M** **T** ; F ruban d'acier à mesurer ; G (Stahl)**B**, **M**  
**BENK**eto : **gard**= § 7 10 : A earth-bank, benching ; F banquette ; G Erdebrüstung, Seitenstreifen  
**BEST**o : **tir**~**a** **VO**jo 3  
**BET**ono p 27 30 36 41 44 48 50 § 8 63-65 70+ a 24+ f 32  
 A Concrete ; F Béton ; G Beton  
 = **armita** a 24 p 28 : A reinforced **C** ; F **B** armé ; G Eisen/**B**, **Stahl**/**B**  
 = **dika** § 65 : A thick **C** ; F **B** épais ; G dicker **B**  
 = **malgrasa** (= malriĉa) p 36 41 : A lean **C**, poor **C** ; F **B** maigre ; G Mager(**B**)  
 = **grasa** (= riĉa) A fat **C**, rich **C** ; F **B** gras, **B** riche ; G fetter **B**

en~igi p 44 48 : A to embed; U to set in C; F enrober dans du B; G einBieren  
 ~a : FUndamento § 71, miksaparato § 63 65 v Miksatoro, paliso' fu 32, PLanko p 37 49, TEgajo § 65; ~BLoko p 51; ~PLando fu 32; ~PLanko p 49; ~POno 48-50; ~SLabo p 49+ § 65; ~SLabaĵo § 65; en~aj IREloj p 44  
 ~ajo fu 32 : A C bed, C walling; F masse en B, B'nage; G B'bett, B'werk, B'sohle  
 ~peco p 49 : A C part; F pièce en B, élément en B; G B'teil  
**BEVELa** PIedo fu 31  
**BEZONi** ponton tr 60 : A to need a bridge; F nécessiter un pont; G eine Brücke benötigen  
 = **dikon** (pri betono) § 65 : A to require a thickness; F exiger une épaisseur; G ein Dickmass erfordern  
**BIENO** : VOjo= § 7  
**BILDo** de fadeno t ap 98 : A image of the thread; F image du fil; G Fadenbild  
**BITo** : Nivel~eto t 91  
**BITUMo** 8 34 64-67 70+ 73 79 : A Bitumen; F Bitume; G Bitumen  
 = **fluidigita** § 66 : A thinned B, softened B; F B rendu fluide; G verflüssigtes B;  
 ~(**iz**)i § 67 : A Bituminize; F Bitumer; G mit B BEstreichen  
**re~izi** § 79 : A re'BI; U to apply B again; F re'BI; G nach'BE  
 ~a **KArtono** § 70  
**BLOko** el masonaĵo p 29+ : A Block of masonry, masonry mass; F Bloc de maçonnerie; G Mauer/Klotz, Masse aus Mauerwerk  
 = **sapeita** f 19 : A undermined B; F masse "sapée" (= sous cavée); G unterhöhlter Block  
 = **el betono** p 30 : A B of concrete; F B de Béton; G Beton/M  
**beton=** peza (de pendp) 51 : A Heavy concrete B, H anchorage B; F B de Bé pesant, massif d'ancrage pesant; G schwerer Verankerungs/K  
**BLOVEGi** (vento) tr 82 : A to blow strongly; F souffler violemment; G stürmisch blasen, stürmen  
**BOATo** pr 52+ : A boat; F Bateau; G Schiff  
 = **granda**, **larĝa**, **ordinara** 53  
**plat=** pr 53 : A pontoon; F B à fond plat, bac; G Prahm

**BOLANTa** KReozoto § 70  
**BOLTo** p 46+ : A D bolt; F boulon; G Bolzen  
**kun~itaj** TABuloj p 46  
**BONa** STato § 79; ~**kvalita** Cimento p 48  
**BORi** galerion tu 55 : A to Dig a gallery; F Forer une galerie; G eine Galerie Bohren  
 = **tunelon** 55 : A to bore (= cut, D) a tunnel; F F un tunnel; G ein Tunnel B  
 = **grundon** tu 56 : A to excavate the earth; F F le sol; G den Boden aufgraben  
 = **truon** f 19 : A to drill a "bore-hole" (= shot-hole); (= shot-hole); F F (= percer) un trou; G ein Bohrloch (= Sprengloch) B  
 ~**aparato** mana f 19 : A hand drill, perforating hammer; F perforateur à main, pistolet; G Handbohrer, Bohrhammer  
 ~**maŝino** f 19 : A drilling machine, pneumatic pick; F perforatrice; G (Gestein)Bohrmaschine  
**BORDo** de rivero p 28 pr 53 : A river-side, river bank; F bord de rivière; G (Fluss)Ufer  
 = **de** (ĉar)ŝoseo 8 37 v ŝose=  
 ŝose= (= bordo de ĉarŝoseo) 7-10 37 73 76 80 : A verge, shoulder; F accotement; G Berme, Randstreifen  
 - **larĝa**' 76  
**voj~ano** § 85 : A road-side dweller, owner whose property is contiguous to road; F riverain (d'une voie publique); G Anlieger (einer Strasse)  
**BORDi** § 7 : A to border; F border, constituer le bord  
 ~a **ĈArpentajo** pr 53; ~a **subTRabo** ligna p 46; **tra~a** Sulko § 9  
**al~iĝo** pr 54 : A disembarkation, Landing; F Accostage; G (An)Landen, Anlegen  
**al~iĝejo** pr 54 : A L place; F emplacement d'A; G Fäherbett, Landestelle, Anlegeplatz  
**BORDERi** (arboj) 4 : A to line; F Border; G sich erstrecken längst...  
 = **plandumon** de p 30 : A to Flank the bottom of a bridge; F B le radier d'un pont; G die Fundamente einer Brücke einfassen  
 = **ponton** (parapeto) 36 : A to F a bridge; F B un pont; G längst der Brücke Sich Hinziehen  
 = **profundajon** § 3 : A to border a precipice; F B un

précipice; G längst einer Tiefe SI H  
 ~**ajo de pavimo** (če trotuaro) 84 : A courses parallel with the kerb; F bordure du pavage; G Bordstein, Bordschwelle, Randsteinreihe  
**BOTELEto** (de akva nivelskopo) 97 : A leg, vial; F fiole; G Rohr  
**BRANĉo** superflua 76 : A superfluous branch; F branche superflue; G entbehrlicher (Ast =) Zweig  
 = **n superfluan forTRANĉi** 76; ~**fasko fu 22 v fascino**  
**BREMSi** Cirkuladon tr 59  
**BRIko** 24 71 : A Brick; F Brique; G Backstein  
 = **bakita** 71 : A fired B, Burned B; F B cuite; G gebrannter B, Klinker  
**pavim=** 71 : A slag paving stone; F B à paver; G Schlackenpflasterstein  
 ~**Pavimo** § 71  
**BRUo** : **ne~a** Cirkulado tr 70  
**BRULi** : ~**SNuro** por eksplodigi f 18  
**BRUTO** tr 62 76 : A beast, domestic quadruped; ~**aro** : cattle; F bestiau; G Vieh  
 ~**VOjo** § 3  
**BULVARDo** § 4 : AF boulevard; G Boulevard, Ringstrasse

## C

**CEDi** : **mal=** v **REZisti** 38  
**CELi** t ap : ~**fendo** 94 : A Sight Vane, sighting slit; F oeilleton; G Spähöffnung; Okularspalt, Schlitz  
 - **harhava** 94 : A hair S, thread visor, S V fitted with hair; F viseur à crin; G Diopter mit Faden  
 ~**STango** 14 90 93; ~**STangi** akklinion 14  
**CELPLAKo** 95 98 : A Sighting Board; U target; F Voyant; G Visiertafel  
 = **damtabule farbita** 95 : A chequer-wise painted S board; F V peint en damier; G Damenbrett/V  
 ~**STango** 91 95  
**CELTABULO** 91 95 98 : A Levelling Staff, stadia Rod; U levelling rod; F Mire; G Nivellierlatte, Latte  
 = **farbita** 95 : A painted L S; F M peinte; G bemalte N  
 = **nivela** 91 95 : A L R; F M à niveler; G N  
 = **nivellega** 95 : A measuring S, self-reading R; F M parlante

- **pliflonggebla** 95 : A extendable S, telescopic S; U extensible L R; F M extensible; G streckbare N  
**CELUMo** t ap 97+ : A Sight; U Sighting; F Visée; G (An)Visieren; Anzielen  
 = **preciza** 94 : A precise S, accurate S; U precision SI; F V précise; G genaues (An)V (= A), genaue Punkt-einstellung  
 ~**a TUBeto** t ap 98  
**CELUMILO** t ap 90 94 : A pin-hole, Sight Vane, S; U Sighting Device; F Viseur; G Diopter, Guckschlitz, Guckspalt  
 = **fiksa** 94 : A fixed S V, screwed S V; U fixed SI D; F alidade fixe; G festes D  
 = **hara** 94 : A S fitted with a hair; U hair sight thread visor; F V à crin; G D mit Faden  
 = **movebla** 94 v alidado  
**CENTIMETRa** SKalo de celtabulo 95  
**CENTRO** de limbo t ap 94 : A centre of limbus; F centre de limbe; G Zentrum der Kreiskala  
**CIKLo** : A F cycle; G Fahrrad  
 ~**anto** 8 69 73 : A cyclist; F cyclist; G Radfahrer  
 ~**a VOjeto** 5 9 73  
**CILINDRo** t ap 94 96 98 : A S Cylinder; F Cylindre; G Zylinder, Büchse  
 = **kava** 98 : A empty C, hollow C; F C évidé; G Hohl/Z  
 = **turnebla** 96 : A rotating C, movable C; F C Mobile, manchon M; G drehbarer Z  
 ~**a gonMETro** 94; **RUI~**  
**CIMENTO** 23-25 36 48 : A Cement; F Ciment; G Zement  
 = **armita** 24; A reinforced concrete; F C armé; G Eisenbeton  
 = **bonkvalita** 48 : A good-quality C; U resistance C; F C de bonne qualité; G hochwertiger Z  
 ~**a** : **MOrtero** 10 36 70 80, **PLanko** 37; **TUbo** 10 27  
**CINTRo** (modeltruso por volbo) 37 : A Centering, soffit, scaffolding; F cintre; G Lehrgerüst  
**for~i** (forigi cintron) 37 : A to take down the C, to strike the vault-form; F décintret; G abräumen  
**CIRKLo** t ap 96 : A Circle; F Cercle; G Kreisbogen  
 = **ina** 96 v+; ~**a KRono** 96; ~**a TUNelo** 55; ~**e IRI** pr 53; ~**ARko** 35 69  
